

André CHERPILLOD

LA  
ZAMENHOFA  
RADIKFARADO



Eldonejo *La Blanchetière*

André CHERPILLOD

LA  
ZAMENHOFA  
RADIIFARADO

Eldonejo *La Blanchetière*

«La tiel nomataj vortoj fremdaj, t. e. tiuj, kiujn la plimulto de la lingvoj prenis el unu fonto, estas uzataj en la lingvo Esperanto sen ŝanĝo, ricevante nur la ortografion de tiu ĉi lingvo; sed ĉe diversaj vortoj de unu radiko estas pli bone uzi senŝanĝe nur la vorton fundamentan kaj la ceterajn formi el tiu ĉi lasta laŭ la reguloj de la lingvo Esperanto». Tio estas la famkonata dekkvina regulo de la Fundamenta Gramatiko. Sekvas ekzemploj, ne la samaj en la diverslingvaj kvin partoj (tragedio, laŭ la franca tragédie, teatro laŭ la angla theatre, germana Theater, rusa театр, pola teatr).

La elektitaj ekzemploj tragedio kaj teatro havas komunan punkton: ili entenas nur fonemojn simplajn, internaciajn, facile esperantigeblajn. Eĉ komencanto povus fabriki ilin. Sed ofte okazas, ke oni bezonas krei novajn vortojn ne tiel facile esperantigeblajn, pro tio ke ili entenas fonemojn fremdajn al la esperanta lingvo. Tial, en la esperanta literaturo aŭ gazetaro, oni ofte renkontas vortojn tre malĝuste faritajn, aŭ faritajn diversmaniere laŭ la bontrovo de ilia aŭtoro.

Rilate la esperantan radikfaradon, oni povas konstati, ke du skoloj ekzistas jam de longe.

La unuan skolon oni povas nomi **grafisma skolo**. Ĝi montras plej grandan respekton al la **grafismo** de la vortoj, kaj al ilia **internacia prononco**, ne nur enlanda. Ekzemple, la franca urbo Chartres (franca prononco [ŝartr]) estis foje esperantigita en Ĉartro, kio ne respondas perfekte al la franca prononco, sed havas la grandan avantaĝon respekti grafisme la komencan C. Mi vidis same la francan urbon Cherbourg [ŝerbur] esperantigita en Ĉerburgo. La rusa vorto перестройка estis esperantigita en **perestrojko**; la nomo de la ŝtatestro Брежнев en Breĵnevo, kio estas internacie komprenebla, parole kaj skribe, same por Rusoj kaj por ne-Rusoj. La nomon de la literatura heroo David Copperfield oni tiel povas esperantigi tre simple en **Koperfildo**, internacia formo: efektive, la Francoj prononcas ja [koperfild], la Germanoj [kopërfild], la Rusoj skribas Конперфильд, la Araboj كوبرفيلد, ktp.

Male, la dua skolo estas la **fonetisma skolo**. Ĝia sola regulo estas la plej granda emo al la respekto de la **nacia fonetismo**, sen konsidero de la ortografio, nek de la diferencoj, kiuj povas ekzisti interne de unu ŝtato inter la anoj de la diversaj provincoj, aŭ inter individuoj. Tamen individuaj diferencoj ja ekzistas: kiam la franca politikulo René Pléven estis ĉefministro en 1950, lia nomo estis prononcata de la Francoj [pleven], [plevë], [plevã], nur laŭ la personaj preferoj. En tiu skolo, oni esperantigas Chartres en Ŝartro, Cherbourg en Ŝerburgo, перестройка en pjerestrojko (ĉar la rusa e estas elparolata tre mole, preskaŭ [je]). Same, mi vidis, sub germana plumo, Breĵnevon strange nomitan Brjoĵnifo (*liele*). Mi vidis ankaŭ Koperfildon mirige ŝanĝitan al **Kopafildo**; mi ne estas aparte sperta pri la fonetiko angla, sed mi vane esploris la prifonetikan ĉapitron de pluraj anglaj gramatikoj, sen trovi eĉ unu etan aludon al er prononcata [a]. La mirinda avantaĝo de tiu sistemo estas ke ĝi igas la vortojn perfekte nekompreneblaj por la alilandanoj, ĉu skribe, ĉu parole, kaj ankaŭ plej ofte por la enlandanoj. Se mi parolas pri

Brjojnifo, prononcata laŭ normala esperanta prononco, al iu ruslingvano, mi forte dubas, ke li komprenos min; kaj verŝajne mi ne havos pli grandan sukceson per la skribado de la vorto. Antaŭ kelkaj jaroj, en bulgara ĵurnalo, mi legis ion pri poeto nomita **Igo**. Mi ne estas klera pri la bulgara literaturo; do mi pensis, ke temas pri iu bulgara poeto **Mro** nekonata de mi. Nur kiam mi legis, kelkajn liniojn poste, ke tiu «Igo» aŭtoras «La Mizerulojn», mi ekkomprenis, ke temas pri nia mondkonata Victor Hugo. Sed kial do ne nomi lin... tute simple **Hugo**, kiel faras la PIV, kaj kiel oni faras en la tuta mondo (la Israelanoj skribas **הוגו** *hūgō*, la Japanoj **フゴ**— *hugō*, ktp)? Uzi internacian lingvon por esti pli malbone komprenata ol per iu fremda lingvo, estas neatendita sukceso, ĉu ne? Oni sukcesus pli bone per Volapuko.

Bedaŭrinde, Zamenhof neniam donis precizajn regulojn por esperantigi etnolingvajn vortojn. Oni vidis, ke la ĉi-supra 15a regulo de la Fundamento estas tre malpreciza kaj malfermas la pordon al ĉiuj fantaziaĵoj. Reguloj pli-malpli precizaj estis eble en la menso de Zamenhof, kaj li aplikis ilin nekonscie, sed li ne skribis ilin en leĝofara formo. Ĝuste ilin mi volas trovi, eĉ parte, esplorante la zamenhofan leksikon. La PIV skribas «*Esperanto praktike kombinas en siaj vortoj la grafismon kun la fonetismo*» (p.302). Jes, sed bedaŭrinde ne tre regule. Kiel oni vidos, la esperantaj zamenhofaj vortoj respeguligas pli ofte la grafismon de la nacilingva etimo, ol ĝian fonetismon.

Mi do klopodos starigi regulojn uzeblajn por krei novajn vortojn **laŭ la zamenhofa penso**. Pri ĉiu fonemo neesperanta en la ĉefaj lingvoj sciataj de Zamenhof, mi serĉos kiamaniere li transskribis ĝin en Esperanton. Ne utilas pritrakti la simplajn kazojn: la latina **lūna** donis la esperantan **luno**; la germana **Tag** donis **tago**. Ĉi tie, la latina aŭ germana vorto unuflanke, kaj la esperanta vorto aliflanke entenas la samajn fonemojn. Male, se oni konsideras, ke **ǎdæquātus** donis **adekvata**, oni povas starigi la regulojn, ke la latina **æ** donis en Esperanto **e**, kaj ke la latina **qu** estas transskribita **kv**. Same, la vortoj **Cezaro** aŭ **Ezopo** informas nin ke Zamenhof regule transskribis per **z** la intervokalan **s** de la vortoj latinaj aŭ grekaj.

Ĉi-poste, nenio respeguligas mian personan opinion, sed nur la opinion de Zamenhof. Mi nur penas eligi el lia menso la neniam skribitajn **regulojn de la radikfarado**. Kiel oni konstatos, ĉi tiuj reguloj ekzistas, sed ne precize: la sama fonemo estas ofte transskribita laŭ pluraj manieroj (kiel ekzemplo, la franca **oi**), pro diversaj kaŭzoj, ne ĉiam klaraj.

Por tio, mi esploris la jenajn verkojn:

- la *Fundamento* (gramatiko, ekzercaro, vortaro);
- la *Zamenhof-Radikaro*, kompilita de E.Wüster;
- la *Lingvaj Respondoj*, de Zamenhof;
- la *Plena Ilustrita Vortaro*, en kiu la zamenhofeco de la vortoj estas indikita (kvankam ne ĉiam, kiel mi ofte konstatis);
- la *Nepivaj Vortoj*, de mi mem.

Mi klasas la esperantajn vortojn laŭ ilia fontolingvo. Evidente, en tiu klasado, estas granda parto da arbitreco: ĉu kiraso devenas de la franca

cuirasse, de la angla cuirass, de la germana Kiraß, de la rusa кираса, aŭ de la pola kirys? Verŝajne ĉefe de la rusa, sed eble de ĉiuj samtempe; cetere mi ne estas en la cerbo de Zamenhof. Do la lokigon de vorto en unu kategorion oni ĉiam povas kontesti. Kiam estas dubo pri la preciza deveno de vorto, mi indikis interkrampe aliajn eblojn (ĉerizo venas de la franca cerise, kun probabla influo de la angla cherry; vualo venas samtempe de la franca voile, de la rusa вуаль, kaj de la pola wual).

Oni atentu, ke tio ne estas Etimologia Leksikono, kvankam ĝi donas etimologiajn informojn. Por havi ĉiujn dezirindajn etimologiajn informojn, estas necese atendi la aperon de mia nun verkata **ETIMOLOGIA KOMPARA VORTARO DE ESPERANTO**, aŭ uzi alian jam aperintan (de E. Vilborg).

La Fundamentaj vortoj estas signitaj de asterisko (\*); la zamenhofaj vortoj ne Fundamentaj estas signitaj de rondeto (°), senkonsidere ĉu ili estas oficialaj aŭ ne. Spite la postulojn de la referenc-maniuloj, mi ne donas la referencojn de la zamenhofaj vortoj ne Fundamentaj; ili estas tre facile troveblaj en la Zamenhof-Radikaro, de E. Wüster; sufiĉas konsulti ĝin.

Kvankam ĉi tie mi interesiĝas nur pri la radikoj, mi ĉiam citas la Fundamentajn vortojn kun finaĵo, laŭ la gramatikaj kategorioj (substantivo, adjektivo, ktp), kiujn ili havas en la Fundamento. Ĉi tiu kategorio ne estas devige la sama, kiel tiu de ilia etimo; sekve, la etimo ne estas ĉiam la ekzakta traduko. Ekzemple: **peine** (substantivo) → **peni** (verbo); **Riegel** (substantivo) → **rigli** (verbo); **siège** «sidilo» → **seĝo**; **tábŭla** «tablo» → **tabulo**.

Mi ne faris, kaj ne intencis fari, statistikan studon, pro tio ke:

- mi ne citas ĉiujn vortojn de la Fundamento (tio estus senutila), kvankam mi esploris la tuton de la Universala Vortaro;
- mi certe ne esploris ĉiujn zamenhofajn vortojn, kio estus apenaŭ ebla; mi citis parton el ili nur kiel trafikajn ekzemplojn.

\* \*  
\*

## I. VORTOJ EL LATINA FONTO

Ilia graveco venas de tio, ke ili ampleksas proksimume 75% de la esperanta leksiko. Kelkaj el ili apartenas al la latino malfrua, aŭ mezepoka, aŭ eĉ moderna. Mi citas ilin kun indiko de la longeco de la vokaloj.

**Æ** aŭ **Œ** → **E**, aŭ tute escepte **A**:

**E**: **ādæquātus** → adekvata°, **cæcīlīa** → cecilio°, **cærīmōnīa** → ceremonio°, **œcōnōmīa** → ekonomio°, **æquīlībrīum** → ekvilibro°, **Ænēās** → Eneo°, **æternus** → eterna\*, **Æsōpus** → Ezopo°, **Phœbus** → Febo°, **phœnix** → fenikso°, **phænōmēnōn** → fenomeno°, **fætōr** → fetoro°, **Græcus** → Greko°, **hēbræus** → hebreo\*, **hærēsis** → herezo\*, **hæsītāre** → heziti°, **chīmæra** → ĥimero\*, **cōmœdīa** → komedio°, **Cræsus** → Krezo° (greke Κροΐσος), **præcīpŭē** → precipe\*, **præcīsus** → preciza\*, **prædicāre** → prediki\*, **præferre**

→ *preferi\**, *praelēgere* → *prelegi°*, *praeter* → *preter\**, *scæna* → *sceno\**,  
*sphæra* → *sfero°*, *tædere* → *tedi\**, *trægœdia* → *tragedio\**, *væ* → *ve\**.

**A:** *cratægus* → *kratago\**. Sola ekzemplo trovita, ne leĝofara.

**-ANT** → **-AND** (por eviti homonimecon kun la participa sufikso -ant):

*planta* → *plando\**.

**-AT** → **-AD**, aŭ **-AT**:

**AD:** *plattus* → *plado\**.

**AT:** *ādæquātus* → *adekvata°*, *prīvātus* → *privata\**.

**AU** → **AŬ:**

*ālauda* → *alaŭdo\**, *applaudere* → *aplaŭdi\**, *audire* → *aŭdi\**, *augūrāre* →  
*aŭguri°*, *Augustus* → *Aŭgusto\**, *autōr* → *aŭtoro\**, *centaurus* → *centaŭro°*,  
*causa* → *kaŭzo\**, *laudāre* → *laŭdi\**, *laurus* → *laŭro\**, *nausēa* → *naŭzi\**,  
*Paulus* → *Paŭlo\**, *pausa* → *paŭzo\**, *plaudere* → *plaŭdi\**, *Plautus* → *Plaŭ-*  
*to°*, *raucus* → *raŭka\**.

**C** sekvata de æ, e, i, y → ĝenerale **C**, kelkfoje **Ĉ** aŭ **K**:

**C:** *alcjōn* → *alciono\**, *bēnēficiŭm* → *benefico°*, *cæcīlīa* → *cecilio°*, *cē-*  
*dēre* → *cedi\**, *cēdrus* → *cedro\**, *cēlēbrāre* → *celebri°*, *centum* → *cent\**,  
*cærīmōnīa* → *ceremonio°*, *certus* → *certa\**, *cervus* → *cervo\**, *cētērus* →  
*cetera\**, *Cæsār* → *Cezaro°*, *Cīcēro/-ōnis* → *Cicerono°*, *cygnus* → *cigno\**,  
*cīcātrīx* → *cikatro\**, *cyclus* → *ciklo°*, *cīcōnīa* → *cikonio\**, *cīchōrīŭm* →  
*cikorio\**, *cīvīlis* → *civila°*, *dēcēre* → *deci\**, *fācīlis* → *facila\**, *Cōcŭtus* →  
*Kocito°*, *concīsus* → *konciza°*, *crux/crŭcis* → *kruco\**, *lancēa* → *lanco°*,  
*Mācēdōn* → *Macedono°*, *narcissus* → *narciso\**, *nēcesse* → *necesa\**, *nōvī-*  
*cīus* → *novico\**, *offīciŭm* → *ofico\**, *pax/pācis* → *paco\**, *præcīsus* → *pre-*  
*ciza\**, *prōcessŭs* → *proseso\**, *prōvincīa* → *provinco\**, *sincērus* → *sin-*  
*cera\**, *sōcīētās* → *societo\**, *vertex/-īcis* → *vertico°*, *vix/vīcis* → *vico\**.

**Ĉ:** *cella* → *ĉelo\**, *cessāre* → *ĉesi\**, *dulcis* → *dolĉa\**, *falx/falcis* → *fal-*  
*ĉi\**, *fæx/fæcis* → *feĉo\**, *fēlīx/-īcis* → *feliĉa\**, *plācēre* → *plaĉi\**, *vox/*  
*vōcis* → *voĉo\**.

**K:** *faucēs* → *faŭko\**, *convincēre* → *konvinki\**, *Mŭcēnæ* → *Mikeno°*, *pistā-*  
*cīŭm* → *pistako\**, *rādix/rādīcis* → *radiko\**, *saddŭcæus* → *sadukeo°*, *sālix/*  
*-īcis* → *saliko\**, *vīncēre* → *venki\**.

Tio respondas malofte al la fonetiko de la antikva latino, en kiu la *c* estis ĉiam prononcata [k]. Sed en la modernaj lingvoj ĝia prononco ne estas unueca: italarumana [ĉ], hispana [ŝ], franca [s], pola-ĉeĥa-serba-hungara [c], kimra-irlanda [k]. Pro tiu diverseco, Zamenhof elektis la prononcon de centra Eŭropo.

**C** ne sekvata de æ, e, i, y → **K**:

*beccus* → *beko\**, *falco* → *falko\**, *fōcus* → *fokuso\**, *formīca* → *formiko\**,  
*fructŭs* → *frukto\**, *cādŭcus* → *kaduka\**, *cattus* → *kato\**, *lōcus* → *loko\**,  
*nēc* → *nek\**, *objectŭs* → *objekto\**, *plectēre* → *plekti\**, *raucus* → *raŭka\**,  
*rectus* → *rekta\**, *sēcāle* → *sekalo\**, *spīca* → *spiko\**, *trītīcum* → *tritiko\**,  
*truncus* → *trunko\**, *urtīca* → *urtiko\**, *vectis* → *vekto\**, *verrŭca* → *veru-*  
*ko\**, *vōcāre* → *voki\**.

Tio estas konforma al la prononco kaj antikva kaj moderna.

Escepte, *Parca donis Parc(in)o°* kaj *Parko°*.

**CC** → **KC**:

accentūs → akcento\*, accipere/acceptum → akcepti\*, accipitēr → akcipitro\*, occidens/-entis → okcidento\*, succinum → sukveno\*, successūs → sukcesi\*, vaccinium → vakcino\*.

CH → Ĥ, aŭ K:

Ĥ: Achērōn → Aĥerono°, ēchō → eĥo\*, Chaldæus → Ĥaldeo°, chāmælēōn → ĥameleono°, chāōs → ĥaoso\*, chīmæra → ĥimero\*, chīrurgus → ĥirurgo°, chōlēra → ĥolero\*, chōrus → ĥoro\*, ichthŭōcolla → iĥtiokolo\*, Colchis/-idis → Kolĥido°, mēchānicus → meĥaniko\*, Mīchāēl → Miĥaelo\*, mōnāchus → monaĥo\*, ōphīōmāchus → ofiomaĥo°, pārōchīa → paroĥo\*, Plūtarchus → Plutarĥo°, trāchīa → traĥeo\*.

K: ānāchōrēta → anakoreto°, brāchŭum → brako\*, cīchōrŭum → cikorio\*, euchāristīa → eŭkaristio°, chāmōmilla → kamomilo\*, chāractēr → karaktero\*, concha → konko\*, chorda → kordo\*, Christus → Kristo\*, chrŭsalilis → krizalido°, chrŭsōlīthus → krizolito°, chrōnicus → kroniko\*, līchēn → likeno°, mēlanchōlīa → melankolio°, nucha → nuko\*, Pascha → Pasko°, pātrīarcha → patriarko°, schisma → skismo°, stōmāchus → stomako\*.

Ĉiuj tiuj latinaj vortoj estas grekdevenaj, krom la malfrua vorto *nucha*, kiu venas de la araba نُخَاع.

DE- → DE-, aŭ DI-:

DE: dēdicāre → dediĉi\*, dēnuntiāre → denunci\*.

DI: dēficēre/dēfectum → difekti\*, dēfīnīre → difini\*.

-ER fina kaj senakcenta → -ER, aŭ -R akcentita, aŭ **nenio**:

ER: chōlēra → ĥolero\*, Jŭpītēr → Jupitero°, carcēr/-ēris → karcerio°, clystēr/-ēris → klistero\*, crātēr/-ēris → kratero\*, lībēr → libera\*, lit-tēra → litero\*, passēr/-ēris → pasero\*, prospērāre → prosperi\*, sincēra → sincera\*, tŭbēr/-ēris → tubero\*, vespēr/-ēris → vespero\*, vīpēra → vipero\*.

R: accipitēr → akcipitro\*, ālābastēr/-tri → alabastro°, cādāvēr/-ēris → kadavro°, cancēr/-cri → kankro\*, lībēr/-bri → libro\*, māgistēr/-tri → magistro°, pīgēr/-gri → pigra°, pīpēr/-ēris → pipro\*, zingībēr/-ēris → zingibro\*.

**nenio**: pāpāvēr/-ēris → papavo\*.

-ET → -ED (por eviti homonimecon kun la sufikso -et), aŭ -ET:

ED: plānēta → planedo\*.

ET: ānāchōrēta → anakoreto°, asceticus → asketo°, complētus → kompleta°, concrētus → konkreta°, quīētus → kvieta\*, sēcrētus → sekreto\*.

EU → EŬ:

euchāristīa → eŭkaristio°, Eurōpa → Eŭropo°, neutrālis → neŭtrala\*.

G sekvata de e, i, œ, y → Ĝ, aŭ Ğ:

Ĝ: Angēlīca → Angeliko°, argilla → argilo\*, aspergēre → aspergi°, gēnērātio → generacio\*, gēnŭs → genio°, gēnītīvus → genitivo\*, gens/-tis → gento\*, gēnŭ → genuo\*, gestŭs → gesto\*, gypsum → gipso\*, lēgēre → legi\*, praelēgēre → prelegi°, tēgēre → tegi\*, trāgœdīa → tragedio°, vēgētāre → vegeti\*.

Ğ: angēlus → anĝelo\*, argentum → arĝento°, gēnērālis → ĝenerala°, gen-

tĭlis → ĝentila\*, germĕn → ĝermo\*, gibba → ĝibo\*, converĝere → konverĝi°, lex/lĕgis → leĝo\*, mŭgĭre → muĝi\*, rex/rĕgis → reĝo\*, urgĕre → urĝi°.

G ne sekvata de e, i, œ, y → G:

angŭlus → angulo\*, ĭmāgo → imagi\*, instĭgāre → instigi\*, vāĝāri → vangi\*, ktp.

GN → GN:

cygnus → cigno\*, dignus → digno°, insignis → insigno\*, lignum → ligno\*, pugnus → pugno\*, regnum → regno\*, signum → signo\*.

GU → plej ofte GV, kelkfoje G:

GV: inguĕn → ingveno\*, lingua → lingvo\*, sanguĭnĕus → sangvina° (ruse сангвина).

G: anguilla → angilo\*, sanguĭs → sango\*, unguĭs → ungo\*.

La elekto de la dulitero gv estas ŝuldita al slava influo: гвардия «gvardio».

H komenca restas:

harmōnĭa → harmonio°, hĕdĕra → hederu\*, hĕpār/hĕpātis → hepato\*, herba → herbo\*, hærĕsis → herezo\*, hernĭa → hernio\*, hĕrōs → heroo\*, hĭrŭdo → hirudo\*, hĭrundo → hirundo\*, histōrĭa → historio\*, hōdĭĕ → hodiaŭ\*, hŭmĭlis → humila\*.

Krom la itala lingvo, preskaŭ ĉiuj modernaj lingvoj konservas same la latinan h, eĉ se ili ĝin ne plu prononcas.

-ID → -ED (por eviti homonimecon kun la sufikso -id), aŭ -ID:

ED: grāvĭdus → graveda\*.

ID: ascāris/-ĭdis → askarido°, aspis/-ĭdis → aspido°, Colchis/-ĭdis → Kolĥido°, chrŭsallis/-ĭdis → krizalido°, lĭquĭdus → likvidi\*.

-ILL aŭ -IL aŭ -YL → -EL (por eviti homonimecon kun la sufikso -il), aŭ -IL:

EL: āmjĭlum → amelo\*, maxilla → makzelo\*, myrtillus → mirtelo\*.

IL: pŭpilla → pupilo\*, sĭmĭlis → simila\*, subtĭlis → subtila°, tranquillus → trankvila\*, ŭtĭlis → utila\*.

-IN → -EN (por eviti homonimecon kun sufikso -in), aŭ -IN, aŭ escepte -UN:

EN: ābōmĭnāri → abomeni\*, Augustĭnus → Aŭgusteno°, āsĭnus → azeno°, delphĭnus → delfeno\*, dĭvĭnāre → diveni\*, exāmĭnāre → ekzameni\*, fraxĭnus → frakseno\*, cāmĭnus → kameno°, carpĭnus → karpeno°, rosmārĭnus → rosmareno°, succĭnum → sukceso\*, Vālentĭnus → Valenteno°.

IN: destĭnāre → destini°, lātĭnus → latino°, lātrĭna → latrino°, lŭpĭnus → lupino°, rĕsĭna → rezino°, termĭnus → termino\*.

UN: fārĭna → faruno\*.

-IUM (en la sciencaj vortoj, plej ofte modernaj) → -I, aŭ -IUM, aŭ nenio:

I: aluminĭum → aluminio°, ammonĭum → amonio°, baryum → bario°, bdellĭum → bedelio°, beryllĭum → berilio°, cerĭum → cerio°, cæsĭum → cezio°, cadmĭum → kadmio°, calcĭum → kalcio°, kalĭum → kalio°, lithĭum → litio°, magnesĭum → magnezio°, minĭum → minio°, natrium → natrio°, niobĭum → niobio°, osmĭum → osmio°, palladĭum → paladio°, rubĭdĭum → rubidio°, samarĭum → samario°, scandĭum → skandio°, silĭcĭum → silicio°, strontĭum → stroncio°, thoriūm → torio°, zirconĭum → zirkonio°.

**IUM:** baryum → bariumo°, gallium → galiumo°, helium → heliumo°, indium → indiumo°, iridium → iridiumo°, ruthenium → ruteniumo°, thallium → taliumo°.

**nenio:** lōlīum → lolo\*, selenium → seleno°.

**J → J, aŭ J:**

**J:** jam → jam\*, jūgum → jugo\*, jūs/jūris → juro\*, justus → justa\*.

**J:** jūrāre → juri\* (france jurer).

**QU → KV, escepte K:**

**KV:** ādæquātus → adekvata°, āqua → akvo\*, antīquus → antikva\*, æquīlībrīum → ekvilibro°, ēlōquens/-entis → elokventa\*, quālītās → kvalito°, quanquām → kvankam\*, quantum → kvanto\*, quartus → kvar\*, quāsī → kvazaŭ\*, quērēlāri → kvereli°, quercūs → kverko\*, quīēs/quīētis → kvieta\*, quintus → kvin\*, līquīdus → likvidi°, līquōr → likvoro°, rēquiem → rekviemo°, sēqui → sekvi\*, sīlīqua → silikvo°, squāma → skvamo\*, tranquillus → trankvila\*.

**K:** quanquām → kvankam\*.

Ankoraŭ ĉi tie temas pri rusa influo. La latina qu iĝas tute regule kv en rusa, kw en pola: акварель, akwarela «akvarelo», акведук, akwedukt «akvedukto», квадрат, kwadrat «kvadrato», ktp.

**RE-** (prefikso) → **RI-** (por eviti homonimecon kun la prefikso -re), aŭ **RE-**:

**RI:** rēbellāre → ribeli\*, rēcīpēre → ricevi\*, rēfūgēre → rifuĝi\*, rēfundēre/rēfūsum → rifuzi\*, rēcōlōre/rēcultum → rikolti\*, rēferre/rēlātum → rilati\*, rēmēdīum → rimedo\*, rēpētēre → ripeti\*, rēpārāre → ripari\*, rēpausāre → ripozi\*, rēvērentīa → riverenco\*.

**RE:** rēdūcēre/rēductum → redukti°, rēflectēre → reflekti°, rēfūtāre → refuti°, rēclāmāre → reklamo°, rēcompensāre → rekompenci\*, respectūs → respekto°, rēvēlātīo → revelacio°, rēsērvāre → rezervi°, rēsistēre → rezisti°.

**S** intervokala → **Z**, aŭ tute escepte **C**:

**Z:** accūsāre → akuzi°, artēmīsīa → artemizio°, bāsis → bazo°, Cæsār → Cezaro°, censūra → cenzuri°, dēsertum → dezerto°, ecclēsīa → eklezio°, Elīysīum → Elizeo°, Æsōpus → Ezopo°, phantāsīa → fantazio°, philōsōphus → filozofa°, phīsīcus → fiziko°, phrāsīs → frazo°, fūrīōsus → furioza°, Gēnēsīs → Genezo°, hæsītāre → heziti°, illūsīo → iluzio°, Jērūsālem → Jeruzalemo°, causa → kaŭzo°, cāsūs → kazo°, cāsēum → kazeo°, concīsus → konciza°, Cræsus → Krezo°, crīsis → krizo°, quāsī → kvazaŭ\*, mīsērīa → mizero°, nausēa → naŭzi°, nāsus → nazo°, pārādīsus → paradizo°, pārāsītus → parazito°, pausa → paŭzo°, pīsum → pizo°, pōēsīs → poezio°, præcīsus → preciza°, præsentāre → prezenti°, prōsa → prozo°, rēsērvāre → rezervi°, rēsīna → rezino°, rēsistēre → rezisti°, rēsultāre → rezulto°, rōsa → rozo°, rōsārīum → rozario°, seriusus → serioza°, thēsis → tezo°, Trāsīmēnus → Trazimeno°, ūsāre → uzi°, ūsurpāre → uzurpi°, vāsūm → vazo°, vēsīca → veziko°, Vēsūvīus → Vezuvio°.

Tio respondas al la franca-itala prononco de la s, kiu plej ofte estas elparolata [z] kiam ĝi troviĝas inter du vokaloj. Oni rimarku tie slavan influon: база, baza «bazo», цензуровать, cenzurować «cenzuri», Элизум, Elizeum «Elizeo»,

кризис, *kryzys* «krizo», узурпировать, *uzurpować* «uzurpi».

**C**: *rēcompensāre* → *rekompenci\**.

Strange, Zamenhof neniam transskribis la intervokalan latinan s per s.

**SC** → **SC**, aŭ pli malofte **SK**:

**SC**: *conscīre* → *konscii\**, *oscītāre* → *oscedi\**, *scæna* → *sceno\**, *sceptrum* → *sceptro\**, *scīre* → *scii\**, *sciēntia* → *scienco\**, *Scylla* → *Scilo\**, *sciūrus* → *sciuro\**.

**SK**: *asceticus* → *asketo\**, *fascis* → *fasko\**, *crescēre* → *kreski\**, *nascī* → *naski\**.

**TI** sekvata de vokalo → **CI**, aŭ **C**, aŭ malofte **TI**, **Ĉ**, **Z**, **DZ**:

**CI**: *actio* → *akcio\**, *ambitio* → *ambicio\**, *Annuntiatio* → *Anunciacio\**, *auspicium* → *aŭspicio\**, *dēclārātio* → *deklaracio\**, *dēclīnātio* → *deklina-cio\**, *dēcōrātio* → *dekoracio\**, *dēlēgātio* → *delegacio\**, *dīrectio* → *di-rek-cio\**, *expōsītio* → *ekspozicio\**, *fictio* → *fikcio\**, *Flōrentia* → *Floren-co\**, *functio* → *funkcio\**, *gēnērātio* → *generacio\**, *inquīsītio* → *inkvizi-cio\**, *instructio* → *instrukcio\**, *interjectio* → *interjekcio\**, *interpunctio* → *interpunkcio\**, *intūītio* → *intuicio\**, *confirmātio* → *konfirmacio\**, *con-jūgātio* → *konjugacio\**, *conjunctio* → *konjunkcio\**, *conventio* → *konven-cio\**, *corpōrātio* → *korporacio\**, *lectio* → *lekcio\** (kaj *leciono\**), *māchīnātio* → *maĥinacio\**, *nātio* → *nacio\**, *nēgātio* → *negacio\**, *ōpērātio* → *opera-cio\**, *oppōsītio* → *opozicio\**, *pātientia* → *pacienco\**, *pollūtio* → *polucio\**, *portio* → *porcio\**, *pōsītio* → *pozicio\**, *præpōsītio* → *prepozicio\**, *prōportio* → *proporcio\**, *rātio* → *racio\**, *rēdactio* → *redakcio\**, *rēvëlātio* → *revelacio\**, *rēvōlūtio* → *revolucio\**, *sanctio* → *sankcio\**, *sectio* → *sek-cio\**, *sēcrētio* → *sekrecio\**, *stātio* → *stacio\**, *vībrātio* → *vibracio\**.

**C**: *audientia* → *aŭdienco\**, *distantia* → *distanco\**, *dōnātio* → *donaci\**, *essentia* → *esenco\**, *cūrātio* → *kuraci\**, *nēgōtium* → *negoco\**, *obstructio* → *obstrukco\**, *pātientia* → *pacienco\**, *pālātium* → *palaco\**, *pōtentia* → *potenco\**, *rēvērentia* → *riverenco\**, *sciēntia* → *scienco\**, *sectio* → *sek-ci\**, *sententia* → *sentenco\**, *servitium* → *servico\**, *spātium* → *spaco\**.

**TI**: *dēmocrātia* → *demokratio\**.

**Ĉ**: *conditio* → *kondiĉo\**, *sūperstītio* → *superstiĉo\**.

**Z** aŭ **DZ**: *prētium* → *prezo\**; *exhālātio* → *haladzo\**.

Konforme, ne al la antikva latina prononco, sed al la moderna slava prononco de tiuj finaĵoj: pole -cja [cja], ruse -ция [cja], germane -tion [cjon], itale -zione [cjone], rumane -ție [cje], hispane -ción [ŝjon], portugale -ção [são], france -tion [sjō], angle -tion [ŝon].

**-UL** → **-OL** (por eviti homonimecon kun la sufikso -ul), aŭ **-UL**, aŭ **-L**, aŭ **nenio**:

**OL**: *artīcūlus* → *artikolo\**, *fēnīcūlum* → *fenkolo\**, *frangula* → *frangolo\**, *cūcūlus* → *kukolo\**, *lupulus* → *lupolo\**, *mēdulla* → *medolo\**, *muscūlus* → *muskolo\**, *ōrācūlum* → *orakolo\**, *pendūlus* → *pendolo\**, *pētūlans* → *pe-toli\**, *pīlūla* → *pilolo\**, *pyrrhula* → *pirolo\**, *pōpūlus* → *popolo\**, *primula* → *primolo\**, *rānuncūlus* → *ranunkolo\**, *rēgūlus* → *regolo\**, *scāpūla* → *ska-polo\**, *scrōfūla* → *skrofolo\**, *tēgūla* → *tegolo\**, *tītūlus* → *titolo\**, *trēmū-lus* → *tremolo\**.

**UL**: *asperula* → *asperulo\**, *aurīcūla* → *aŭrikulo\**, *bētūlus* → *betulo\**,

forficŭla → forfikulo°, formŭla → formulo°, ĭnocŭlāre → inokuli\*, insŭla → insulo\*, calcŭlāre → kalkuli\*, campanula → kampanulo°, capsŭla → kapsulo\*, cŭāgŭlāre → koaguli°, cŭmŭlāre → kumuli°, mǎcŭla → makulo\*, mergŭlus → mergulo°, mŭdŭlāri → moduli°, nĕbŭla → nebulo\*, ŭcŭlus → okulo\*, partĭcŭla → partikulo°, postŭlāre → postuli\*, pustŭla → pustulo°, rĕgŭla → regulo\*, spĕcŭlum → spegulo\*, tǎbŭla → tabulo\*.

L: circŭlus → cirklo°, cŭnĭcŭlus → kuniklo°, mĭrǎcŭlum → miraklo°, pǎnĭcŭla → paniklo°, pŭpŭlus → poplo\*, tǎbŭla → tablo\* (france-angle table), vestibŭlum → vestiblo\*.

nenio: crĕpuscŭlum → krepusko\*, pĕdĭcŭlus → pediko\*, pĕnĭcŭlus → peniko\*, testĭcŭlus → testiko\*.

La finaĵo -ol evitas homonimecon kun la sufikso -ul. Sed oni vidas, ke la zamenhofa zorgo eviti la vortfinojn -an, -et, -id, -il, -in, -ul, tute ne estas konstanta.

X → KS, aŭ KZ, aŭ S:

KS: Ajax → Ajakso°, axis → akso\*, axĭŭma → aksiomo°, anthrax → antrakso°, dextĕr → dekstra\*, excellentĭa → ekscelenco\*, excessŭs → eksceso°, excitāre → eksciti\*, excursŭs → ekskurso\*, expĕdĭre → ekspedi\*, explŭdĕre → eksplodi\*, expŭsĭtĭo → ekspozicio\*, extĕr → ekster\*, extermĭnāre → ekstermi\*, extrā → ekstra\*, extrĕmus → ekstrema\*, fixus → fiksi°, flexĭo → fleksio°, coxa → kokso\*, luxŭs → lukso\*, proxĭmus → proksima\*, sexŭs → sekso\*, taxāre → taksi\*, texĕre → teksio\*.

KZ: exaltāre → ekzalti°, exāmĭnāre → ekzameni\*, exemplum → ekzemplo\*, exercĕre → ekzerci\*, exĭlĭum → ekzili\*, existĕre → ekzisti\*, maxilla → makzelo\*, oxǎlis → okzalo\*.

S: exceptāre → escepti\*, explŭrāre → esplori\*, exprĭmĕre → esprimi\*, extingŭere → estingi\*.

Y → I:

hystrix/-ĭcis → histriko\*, clystĕr → klistero\*, myrtŭs → mirto\*, mystĕrĭum → mistero\*, syllāba → silabo\*, systĕma → sistemo\*.

Kiam la nominativa radiko malsamas de la genitiva, la esperanta vorto venas plej ofte de la **genitiva** formo, sed ankaŭ kelkfoje de la **nominativa**:

**genitivo**: abbās/-ātis → abato\*, ascāris/-ĭdis → askarido°, asclĕpĭāš/-ādis → asklepiado°, aspĭs/-ĭdis → aspido°, bŭs/bŭvis → bovo\*, Cĭcĕro/-ŭnis → Cicerono°, ĕsox/ĕsŭcis → ezoko\*, fǎcultās/-ātis → fakultato°, fons/fontis → fonto°, gens/gentis → gento°, gĭgās/-antis → giganto°, grex/grĕgis → grego°, hĕpār/hĕpātis → hepato\*, jŭglans/jŭglandis → juglando°, jŭs/jŭris → juro°, calx/calcis → kalko\*, cǎro/carnis → karno°, crux/crŭcis → kruco\*, crŭs/crŭris → kruro\*, lǎc/lactis → lakto°, lectĭo/-ŭnis → leciono°, lex/lĕgis → leĝo°, lens/lentis → lento°, lĕpŭs/lĕpŭris → leporo°, ĭmax/-ācis → limako\*, Mars/-tis → Marto\*, nĭĝĕr/nĭĝri → nigra°, nox/noctis → nokto°, pax/pācis → paco\*, pǎtĕr/pǎtris → patro°, perdix/-ĭcis → perdriko\*, pŭmex/-ĭcis → pumiko\*, rǎdix/-ĭcis → radiko°, rĕĝĭo/-ŭnis → regiono°, rex/rĕgis → reĝo°, sǎgax/-ācis → sagaca\*, sǎlix/sǎlĭcis → saliko°, sĭlens/-entis → silenti°, sĭlex/-ĭcis → siliko°, sŭrex/-ĭcis → soriko\*, strĭx/strĭgis → strigo\*,

ulcus/-ĕris → ulcero\*, Vĕnus/-ĕris → Venero°, vertex/-ĭcis → vertico°, vox/vōcis → voĉo\*.

Plej ofte, la genitiva radiko estas pli internacia, kio pravigas tiun elekton.

**nominativo:** Ajax/Ajācis → Ajakso°, ānās/ānātis → anaso\*, anthrax/-ācis → antrakso°, cĭmex/-ĭcis → cimo\*, cĭvītās/-ātis → civito°, fācultās/-ātis → fakulto°, frātĕr/-tris → frato\*, fŭlĭgo/-ĭnis → fulgo\*, hōmo/hōmĭnis → homo\*, carbo/-ōnis → karbo\*, corpŭs/-ōris → korpo\*, quālītās/-ātis → kvalito°, lĕgĭo/-ōnis → legio\*, Mars/-tis → Marso°, mens/mentis → menso°, mŭs/mŭris → muso\*, nōmĕn/nōmĭnis → nomo\*, nŭx/nŭcis → nukso\*, passiō/-ōnis → pasio\*, pāvo/pāvōnis → pavo\*, pulmō/-ōnis → pulmo\*, rĕlĭgĭo/-ōnis → religio\*, rōs/rōris → roso\*, sāpo/-ōnis → sapo\*, sōcĭētās/-tātis → societo\*, stercŭs/-ōris → sterko\*, thĕma/-ātis → temo\*, tempŭs/-ōris → tempo\*, testŭdo/-ĭnis → testudo\*, virgo/-ĭnis → virga\*, virtŭs/-ŭtis → virto\*.

Ĉu por eviti dusencecon: karbono estas alio ol karbo; nukso ne estas nuko; «anato» kreus konfuzon kun la sufikso -ato. Ĉu por eviti senutile tro longan vorton: pulmo anstataŭ «pulmono».

La verboj venas de la **supina** radiko aŭ de la **infinitiva**:

**supino:** accĭpĕre/acceptum → akcepti\*, assĕrĕre/assertum → aserti\*, dĭrĭgĕre/dĭrectum → direkti\*, flectĕre/flexum → fleksi\*, fōdĕre/fossum → fosi\*, infundĕre/infŭsum → infuzi\*, confĭtĕri/confessum → konfesi\*, confundĕre/confŭsum → konfuzi\*, contundĕre/contŭsum → kontuzi\*, corĭgĕre/correctum → korekti\*, occĭdĕre/occāsum → okazi\*, permittĕre/permisum → permesi\*, prōdŭcĕre/prōductum → produkti\*, prōmittĕre/prōmissum → promesi\*, prōtĕgĕre/prōtectum → protekti\*, prōvĭdĕre/prōvĭsum → provizi\*, rĕfundĕre/rĕfŭsum → rifuzi\*, rĕcōlĕre/rĕcultum → rikolti\*, rĕferre/rĕlātum → rilati\*, trādŭcĕre/trādŭctum → traduki\*.

**infinitivo:** attingĕre/attactum → atingi\*, dispōnĕre/disposĭtum → disponi\*, impōnĕre/impōsĭtum → imponi°, compāti/compassum → kompati\*, confĭdĕre/confĭsum → konfidi\*, conclŭdĕre/conclŭsum → konkludi\*, lĕgĕre/lectum → legi\*, offendĕre/offensum → ofendi\*, prōpōnĕre/prōpōsĭtum → proponi\*, rĭdĕre/rĭsum → ridi\*.

La **finajoj** plej ofte ne estas konservataj:

ābundans → abunda°, actŭs → akto°, ātrĭplex → atriplo\*, beccus → beko\*, cĭmex → cimo\*, fornax → forno\*, fulmĕn → fulmo\*, fundus → fundo\*, germĕn → ĝermo\*, Hercŭlĕs → Herkulo° (ankaŭ Herkuleso°), cannābis → kanabo\*, corpus → korpo\*, cōturnĭx → koturno\*, crĭmĕn → krimo\*, lŭmĕn → lumi\*, nĕpōs → nepo\*, nōmĕn → nomo\*, nŭbĕs → nubo\*, pulvis → polvo\* kaj pulvo\*, pŭlex → pulo\*, scōlōpax → skolopo\*, vermĭs → vermo\*, vertex → verto\*, vōlŭmen → volumo\*, vulpĕs → vulpo\*.

Sed ekzistas **esceptoj**:

angĕlus → anĝeluso°, ānŭs → anuso°, Argus → Arguso°, berberis → berberiso°, fōcus → fokuso\*, glōbus → globuso°, Hercŭlĕs → Herlukeso° (ankaŭ Herkulo°), inguĕn → ingveno\*, cōnus → konuso\*, corpus → korpuso\*, crōcus → krokuso°, lōtus → lotuso°, Mĭnōs → Minoso°, mōrus → moruso°, pārŭs → paruo\*, pōlus → poluso\*, vōlŭmen → volumeno°.

Preskaŭ ĉiuj tiuj esceptoj celas eviti homonimecon inter du malsamaj vortoj: anĝelo/anĝeluso, foko/fokuso, kono/konuso, korpo/korpuso, mino/Minoso, paro/paruo, Polo/poluso, volumo/volumeno, ktp.

## II. VORTOJ EL GREKA FONTO

**AI** → E, aŭ tute escepte **AJ**:

**E**: Αἰνείας → Eneo°, αἰθήρ → etero°, Αἴσωπος → Ezoro°, φαινόμενον → fenomeno°, Ἥφαιστος → Hefesto°, αἵρεσις → herezo°, Χαλδαῖος → Haldeo°, χαμαιλέων → hameleono°, χίμαιρα → himerio°, σφαῖρα → sfero°.

**AJ**: καί → kaj\*.

**EY** → EŬ:

Εὐφράτης → Eŭfrato°, εὐχαριστία → eŭkaristio°, Εὐμενίδης → Eŭmenidoj°, νεῦρον → neŭro°, ψεῦδος → pseŭdo-, Ζεὺς → Zeŭso°.

**Z** → Z:

Ἀμαζών → Amazono°, ζηλωτής → zeloto°, Ζεὺς → Zeŭso°.

**Θ** → T:

Ἀθῆναι → Atenoj°, αἰθήρ → etero°, Φαέτων → faetono°, φθίσις → ftizo\*, Προμηθεύς → Prometeo°, θέατρον → teatro\*, θέμα → temo\*, Θεόδωρος → Teodoro\*, θέσις → tezo\*, Θυέστης → Tiesto°.

La antikva prononco de la litero θ estis eble [š]. Sed ĉar tiu sono ne ekzistas en la plejparto de la lingvoj (krom la angla), la grekaj vortoj entenantaj ĝin pasis al preskaŭ ĉiuj lingvoj ĉu kun simpla t, ĉu kun th prononcata [t].

**K** antaŭ ε, η, ι, υ → C (kiel en latina), aŭ pli malofte **K**:

**C**: Ἀλκιβιάδης → Alcibiado°, κύκλος → ciklo°, κιχόριον → cikorio\*, Κώκυτος → Kocito°, Μακεδών → Macedono°, Σκύλλα → Scilo°.

**K**: Μυκῆναι → Mikeno°, Σκύθαι → Skitoj°.

**Ξ** → **KS** (kiel en rusa):

ἄξιωμα → aksiomo°, Ἀλέξανδρος → Aleksandro\* (ruse Александр), ἄνθραξ → antrakso°, Ξάνθος → Ksanto°, λεξικόν → leksikono\*.

**OI** → E, aŭ **OJ**:

**E**: Φοῖβος → Febo°, φοῖνιξ → fenikso°.

**OJ**: οἶστρος → ojstro°.

**Σ** intervokala → Z, tre malofte **S**:

**Z**: ἀρτεμισία → artemizio°, δόσις → dozo°, Ἠλύσιος → Elizeo°, Αἴσωπος → Ezoro°, φαντασία → fantazio°, φιλόσοφος → filozofo°, φυσικός → fiziko\*, φράσις → frazo°, φθίσις → ftizo\*, Γένεσις → Genezo°, αἵρεσις → herezo°, χρυσαλλίς/-ίδος → krizalido°, χρυσόλιθος → krizolito°, πίσον → rizo°, ποίησις → poezio°, προσήλυτος → prozelito°, Σίσυφος → Sizifo°.

**S**: εἰσωτερικός → esotera°.

**Υ** → I:

Ἠλύσιος → Elizeo°, φυσικός → fiziko\*, Κάρυβδις → Ĥaribdo°, Κώκυτος → Kocito°, Μυκῆναι → Mikeno°, μύρτος → mirto\*, μυστήριον → mistero\*, Πύρρος → Pirro° (latine Pyrrhus), πόρφυρος → porfiro\*, ψυχή → psiko°, Σκύλλα → Scilo°, συλλαβή → silabo\*, σύστημα → sistemo\*, Σίσυφος → Sizifo°, Σκύθαι → Skitoj°.

Φ → F:

Δελφοί → Delfoj°, φάρυγξ/φάρυγγος → faringo\*, φυσικός → fiziko\*, φώκη → foko\*, φωσφόρος → fosforo\*, φράσις → frazo°, φθίσις → ftizo\*, πόρφυρος → porfiro°, Σοφία → Sofio°.

Kiel en multaj lingvoj (itala, hispana, portugala, pola, ktp), kvankam ĉe la Helenoj ĝi estis prononcata [ph] kaj ne [f]; la Helenoj ne konis la fonemon [f].

X → Ĥ (precipe en la propraj nomoj), aŭ K:

Ĥ: Ἀχέρων → Aĥerono°, Ἀχιλλεύς → Aĥilo°, Ἀνδρομάχη → Andromaho°, ἀρχαϊσμός → arĥaismo°, δραχμή → draĥmo°, ἦχώ → eĥo°, Καλδαῖος → Ĥaldeo°, χαμαιλέων → ĥameleono°, χάος → ĥaoso°, χίμαιρα → ĥimero°, χειρουργός → ĥirurgo°, χολέρα → ĥolero°, χορός → ĥoro°, ἰχθυόκολλα → iĥtiokolo°, Κολχίς/-ίδος → Kolĥido°, μηχανικός → meĥaniko°, Μιχαήλ → Miĥaelo° (ruse Михаил), μοναχός → monaĥo°, μόναρχος → monarĥo°, ὀφιομάχος → ofiomaĥo°, Πλούταρχος → Plutarĥo°, τραχεῖα → traĥeo°.

La prononco de rĥi, kutima por slavlingvanoj (арханѣм «arĥaismo», монарх «monarĥo»), ne estas facila por multaj alilingvanoj. Pro tio, arkaismo, monarko, ktp, estis oficialigitaj (OAB).

K: ἀμφίβραχος → amfibrako°, ἀναχωρητής → anakoreto°, ἀναρχία → anarkio°, βραχίων → brako°, κικχόριον → cikorio°, ἐποχή → epoko° (sed Grabowski uzis epoĥo), εὐχαριστία → eŭkaristio°, χαρακτήρ → karaktero°, κόγχη → konkko°, χορδή → kordo°, χρηστομάθεια → krestomatia°, Χριστός → Kristo°, χρυσαλλίς → krizalido°, χρυσόλιθος → krizolito°, χρωμα → kromo°, χρονικός → kroniko°, μελαγχολία → melankolio°, Πάσχα → Pasko°, πατριάρχης → patriarko°, ψυχή → psiko°, σχίσμα → skismo°, στόμαχος → stomako°.

Kiel ĉe la vortoj latindevenaj, la esperanta radiko venas ofte de la **genitiva** radiko, sed ankaŭ de la **nominativa**:

**genitivo**: φάλαγξ/-αγγος → falango°, φάρυγξ/-υγγος → faringo°, γίγας/-αντος → giganto°, λάρυγξ/-υγγος → laringo°, μυριάς/-άδος → miriado°.

**nominativo**: ἄξιωμα/-ατος → aksiomo°, ἄνθραξ/-ακος → antrakso°, Πάρις/-ίδος → Pariso°, θέμα/-ατος → temo°.

Same kiel ĉe la vortoj latindevenaj, la **finaloj** plej ofte ne estas konservataj. Sed estas **esceptoj**:

Ἅιδης → Hadeso°, λεξικόν → leksikono°, Μίνως → Minoso°.

## III. VORTOJ EL FRANCA FONTO

AI [ɛ] → A, aŭ AJ, aŭ pli ofte E:

**A:** balai → balai\*, flairer → flari\*, glaive → glavo\*.

**AJ:** frai → frajo\*, gai → gaja\*, grain → grajno\*, salaire → salajro\*, semaine → semajno\*, train → trajno°, trait → trajto\*.

**E:** affaire → afero\*, anglaise → anglezo°, bréviaire → breviero°, circulaire → cirkulero\*, chaîne → ĉeno\*, exemplaire → ekzemplero\*, grain → greno\*, complaisance → komplezo\*, quarantaine → kvaranteno\*, plaindre → plendi\*, portrait → portreto\* (ruse портрет, pole portret), raisonner → rezoni°, saison → sezono\*, solitaire → solitero°, souverain → suvereno°, traîner → treni\*, voltairien → volterano°.

AIL aŭ AĪ aŭ -AILLE [aj] → -AJL, aŭ -ALJ, aŭ -AL, aŭ -ALI, aŭ -AJ:

**AJL:** ail → ajlo\* (ne devenas de la latina *ailum*, kiu donus «alio»), email → emajlo\* (ruse эмаль), canaille → kanajlo\*, paille → pajlo\*, tailleur → tajloro\*.

**ALJ:** tirailleur → tiraljoro°.

**AL:** bataille → batali\*, détail → detala\* (pole detal), médaille → medalo\* (angle-pole medal, ruse медаль).

**ALI:** médaillon → medaliono\*, taille → talio\*.

**AJ:** faille → fajo°, faïence → fajenco\*.

AU aŭ EAU [ø] → AŬ, aŭ pli ofte O:

**AŬ:** sauce → saŭco\*.

**O:** beau- → bo-\*, épaulette → epoleto\* (ruse эполет), carreau → karoo\*, sauvage → sovaĝa\*, chauvinisme → ŝovinismo° (ruse шовинизм).

AY [ej] → AJ:

crayon → kraĵono\*.

AY [ei] → EJ:

paysage → pejzaĝo\*.

C sekvata de e, i, y [s] → C, pli malofte Ĉ:

**C:** balancer → balanci\*, cerveau → cerbo\*, cigare → cigaro\*, cygne → cigno\*, circulaire → cirkulero\*, citer → citi\*, civiliser → civilizizi\*, facette → faceto\*, grimace → grimaco\*, grincer → grinci\*, commencer → komenci\*, quittance → kvitanci\*, malicieux → malica\*, menacer → minaci\*, nuance → nuanco\*, parcelle → parcelo°, place → placo\*, police → polico\*, prince → princo\*, rance → ranca\*, sauce → saŭco\*, chanceler → ŝanceli\*.

**Ĉ:** cerise → ĉerizo\* (laŭ la angla cherry), cercueil → ĉerko\*, ci → ĉi\*, ciel → ĉielo\*, fiancé → fianĉo\*, lacet → laĉo\*, pincer → pinĉi\* (angle pinch), sorcier → sorĉi\*, sucer → suĉi\*.

Tiu elekto de c aŭ Ĉ respondas al la grafismo, ne al la fonetismo.

C ne sekvata de e, i, y [k] → K:

abricot → abrikoto\*, blanc → blanka\*, cadre → kadro\*, oncle → onklo\*, tricot → trikoto\*, ktp.

Ç [s] → S:

Alençon → Alensono°, caleçon → kalsono\*, maçon → masoni\*.

CH [ŝ] → plej ofte Ĉ, pli malofte Ŝ, tre malofte K:

Ĉ: acheter → aĉeti\*, branche → branĉo\* (angle branch), brèche → breĉo°, chagriner → ĉagreni\*, chamois → ĉamo\*, chambre → ĉambro\*, champagne → ĉampano\*, chapeau → ĉapelo\*, chapitre → ĉapitro\*, char → ĉaro°, charlatan → ĉarlatano\*, charmant → ĉarma\*, charnière → ĉarniro\*, charpenter → ĉarpenti\*, charpie → ĉarpio\*, chasser → ĉasi\*, chaste → ĉasta\*, chez → ĉe\*, chef → ĉefa\*, chemise → ĉemizo\*, chaîne → ĉeno\*, cheval → ĉevalo\*, chiffon → ĉifono, dimanche → dimanĉo\*, fétiche → fetiĉo°, capuche → kapuĉo\* (itale cappuccio), cartouche → kartoĉo\* (itale cartuccia), cochenille → koĉenilo\*, cracher → kraĉi\*, crochet → kroĉi\*, cruche → kruĉo\*, mâcher → maĉi\*, marchander → marĉandi\*, mèche → meĉo\*, niche → niĉo\*, perche → perĉo\*, riche → riĉa\*, torche → torĉo\*, trancher → tranĉi\*.

La esperanta Ĉ respondas al la grafismo de la francaj etimoj. En tiuj ĉi kazoj, la etimo de la esperanta vorto estas vorto vere franca, ne retrovebla samforme en aliaj lingvoj; aŭ ĝi estas retrovebla en aliaj lingvoj en kiuj la ch valoras [ĉ].

Ŝ: accoucher → akuŝi\* (pole akuszerka, ruse акушерка «akuŝistino»), artichaut → artiŝoko\* (ruse артишок), brochure → broŝuro° (germ. Broschüre, ruse брошюра, pole broszura), bouche → buŝo\*, douche → duŝo°, échafaud → eŝafodo\* (germane Schaffot, ruse эшафот), galoche → galoŝo\* (germ. Galosche, ruse галоша, pole kalosz), cachet → kaŝi\*, cloche → kloŝo\* (pole klosz), coqueluche → kokluŝo\* (ruse коклюш, pole koklusz), coucher → kuŝi\*, marcher → marŝi\* (germ. marschieren, ruse маршировать), machine → maŝino\* (germ. Maschine, ruse машина, pole maszyna), mouche → muŝo\*, parachute → paraŝuto° (ruse парашют), poche → poŝo\*, retoucher → retuŝi° (ruse ретушировать, pole retuszować), chacal → ŝakalo\* (germ. Schakal, ruse шакал, pole szakal), chamois → ŝamo\*, chancelier → ŝanceli\*, changer → ŝanĝi\*, charger → ŝargi\* kaj ŝarĝi\*, chauvinisme → ŝovinismo° (ruse шовинизм), toucher → tuŝi\*.

En tiuj ĉi vortoj, la etimo de la esperanta vorto estas ofte (sed ne ĉiam) franca vorto retrovebla en aliaj lingvoj kun la sono [ŝ]. Tiukaze, oni povas ankaŭ konsideri, ke la veraj etimoj de tiuj vortoj estas pli ĝuste la germana aŭ la rusa aŭ la pola vorto.

K: plancher → planko\*. Escepta ekzemplo.

CU sekvata de vokalo [kü] → KV, aŭ KU:

KV: biscuit → biskvito\* (ruse бисквит).

KU: cuire → kuiri\*, cuillère → kulero\*.

EI [ej] → E, aŭ EJ (sed la ekzemploj estas malmultaj):

E: peine → peni\*.

EJ: veine → vejno\*.

-EIL kaj -EILLE [ej] → -EL, aŭ -ELJ:

EL: abeille → abelo\*, bouteille → botelo\*, oreille → orelo\*.

ELJ: Marseillaise → Marseljezo°.

-ÈRE [er] → -ER, aŭ -IR (malmultaj ekzemploj):

ER: cuillère → kulero\*, manière → maniero\*, visière → viziero\*.

**IR: charnière** → ĉarniro\*.

**-ET [ɛ]** kaj **-ETTE [et]** → **-ET**, aŭ **ED**:

**ET: allumette** → alumeto\*, **baïonette** → bajoneto\*, **ballet** → baletto\*, **billet** → bileto\*, **blanquette** → blanketo\*, **cabinet** → kabineto\*, **coquet** → koketo\*, **corset** → korseto\*, **minaret** → minareto\*, **parquet** → pargeto\*, **roulette** → ruleto\*, **soubrette** → subreto\*.

**ED: bicyclette** → bicikledo\*, **buffet** → bufedo\*, **bouquet** → bukedo\*, **cigarette** → cigaredo\*, **piquet** → pikedo\*, **sterlet** → sterledo\*.

La elekto de **-ed** celas la eviton de homonimeco kun la sufikso **-et**, sed tiu zorgo ne estas konstanta ĉe Zamenhof. Pro tio, la nuna hezito inter disketo kaj diskedo, kabareto kaj kabaredo, kaseto kaj kasedo, ktp.

**EU [ø]** → **AŬ** (ununura ekzemplo, ne leĝofara):

**jeudi** → ĵaŭdo\*.

**EUIL [œj]** → **OJL**:

**seuil** → sojlo\*.

**G** sekvata de **e, i [j]** → **Ĝ** (kaj ne **J**), kelkfoje **G**:

**Ĝ: âge** → aĝo\*, **Alger** → Alĝero°, **apanage** → apanaĝo°, **arranger** → aranĝi\*, **bandage** → bandaĝo°, **bourgeois** → burĝo\*, **bourgeon** → burĝono\*, **danger** → danĝero\*, **dommage** → domaĝo\*, **étage** → etaĝo\* (germane Etage, ruse этаж), **forger** → forĝi\*, **frange** → franĝo\*, **fromage** → fromaĝo\*, **gorge** → gorĝo\*, **gémir** → ĝemi\*, **gêner** → ĝeni\*, **Genève** → Ĝenevo°, **horloge** → horloĝo\*, **juger** → juĝi\*, **courage** → kuraĝa\*, **large** → larĝa\*, **loger** → loĝi\*, **manège** → maneĝo°, **manger** → manĝi\*, **nager** → naĝi\*, **négligé** → negliĝo\*, **neige** → neĝo\*, **orange** → oranĝo\*, **page** → paĝo\*, **paysage** → pejzaĝo\*, **prestige** → prestiĝo°, **rouge** → ruĝa\*, **sage** → saĝa\*, **siège** → seĝo\* kaj sieĝi\*, **sergent** → serĝento\*, **songe** → songo\*, **sauvage** → sovaĝa\*, **changer** → ŝanĝi\*, **charger** → ŝargi\*, **venger** → venĝi\*, **village** → vilaĝo\*, **visage** → vizaĝo\*, **voyage** → vojaĝi\*.

**G: dégeler** → degeli\*, **gélatine** → gelateno\*, **charger** → ŝargi\*.

La transskribo de **g** al **ĝ** montras, ke ankaŭ ĉi tie Zamenhof respektis pli la grafismon ol la fonetismon. Cetere, en tiu kazo, la prononca diferenco inter la **ĝ** kaj la franca **g [j]** ne estas granda.

**GN [nj]** → **N**, aŭ **GN**, aŭ **JN**, aŭ **NJ**:

**N: accompagner** → akompani\*, **champagne** → ĉampano\*.

**GN: cygne** → cigno\*, **digne** → digna°, **indigner** → indigni\*.

**JN: gagner** → gajni\* (ankaŭ de la angla gain).

**NJ: Boulogne** → Bulonjo\*, **castagnette** → kastanjeto°, **Cologne** → Kolonjo°.

**GU** sekvata de **e, i [g]** → **GV**:

**guider** → gvidi\*, **Guinée** → Gvineo°.

Slava influo (**Guinée** → ruse Гвинея, pole Gwinea), ĉar tiu **gu** estas elparolata simple [g].

**H** [ne prononcata] → **H**:

**hier** → hieraŭ\*, **honte** → honti\*, **horloge** → horloĝo\*, **hôtel** → hotelo\*.

Respektas nur la grafismon, ĉar la franca **h** havas nur skriban rolon (etimologian).

La vorto **omaro\*** ŝajnas escepto, sed ĝi venas de la rusa **о́мар**.

-ILL [ij] → -IL, aŭ L:

**babiller** → **babili\***, **briller** → **brili\***, **grillon** → **grilo\***, **cochenille** → **koĉenilo\***, **cuillère** → **kulero\***, **vanille** → **vanilo\*** (germ. **Vanille**, ruse **ваниль**, pole **wanilia**).

-ILL [j] → LJ:

**bouillon** → **buljono\*** (ruse **бульон**, pole **buljon**).

-IN [ɛ̃] kaj -INE [in] → -EN (por eviti homonimecon kun la sufikso -in):

**arlequin** → **arlekeno\***, **baldaquin** → **baldakeno\***, **bassin** → **baseno°**, **bobine** → **bobeno\***, **chagriner** → **ĉagreni\***, **domino** → **domeno\***, **festin** → **festeni\***, **gélatine** → **gelateno\***, **jacobin** → **jakobeno°**, **capucin** → **kapuceno\***, **carabine** → **karabeno\***, **crétin** → **kreteno°**, **coussin** → **kuseno\***, **magasin** → **magazeno\***, **maroquin** → **marokeno\***, **Martin** → **Marteno°**, **martin** → **mateno\***, **nankin** → **nankeno\***, **platine** → **plateno\***, **vélin** → **veleno\***.

J [j] → J, aŭ Ĝ, aŭ Ĵ:

**J**: **jabot** → **ĵaboto°**, **jaloux** → **ĵaluza\***, **jargon** → **ĵargono°**, **jeudi** → **ĵaŭdo\***, **jeter** → **ĵeti\***, **jockey** → **ĵokeo°** (angla vorto), **jongler** → **ĵongli\***, **Juan** → **Ĵuano°**, **journal** → **ĵurnalo\***, **justement** → **ĵus\***.

**Ĝ**: **jardin** → **ĝardeno\*** (grafisma influo de la angla **garden**, aŭ germana **Garten**), **joie** → **ĝoji\*** (angle **joy**), **jouir** → **ĝui\***, **juste** → **ĝusta\***.

**Ĵ**: **jacobin** → **jakobeno°**, **jupe** → **ĵupo\*** (ruse **юбка**).

ŒU [œ] → E, aŭ O:

**E**: **cœur** → **kero\***, **par cœur** → **parkere\***.

**O**: **manceuvrer** → **manovri\***.

OI [wa] → OI, aŭ OJ, aŭ OE, aŭ O, aŭ E, aŭ UA (neniu preciza regulo):

**OI**: **foire** → **foiro\***, **soif** → **soifi\***.

**OJ**: **fois** → **fojo\***, **foin** → **fojno\***, **coin** → **kojno\***, **voie** → **vojo\***.

**OE**: **point** → **poento\***.

**O**: **croiser** → **krozi\***, **toile** → **tolo\***.

**E**: **Artois** → **arteza°**, **voiture** → **veturi\*** (itale **vettura**).

**UA**: **exploiter** → **ekspluati°**, **mémoire** → **memuaro°**, **trottoir** → **trotuaro\*** (ruse **тротуар**), **toilette** → **tualetto\*** (ruse **туалет**, pole **tualeta**), **voile** → **vualo\*** (ruse **вуаль**, pole **wual**).

OY [wa] → OJ:

**aboyer** → **boji\***, **loyal** → **lojala°**, **royalisme** → **rojalismo°**, **voyager** → **vojaĝi\***.

QU sekvata de alia vokalo [k] → K, aŭ KV:

**K**: **acquérir** → **akiri\***, **arlequin** → **arlekeno\***, **baldaquin** → **baldakeno\***, **brique** → **briko\***, **que** → **ke\***, **manquer** → **manki\***, **maroquin** → **marokeno\***, **moquer** → **moki\***, **piquer** → **piki\***, **presque** → **preskaŭ\***, **suffoquer** → **sufoki\***.

**KV**: **quarantaine** → **kvaranteno\***, **quittance** → **kvitanci\*** (ruse **квитанция**).

S intervokala [z] → Z:

**amuser** → **amuzi\***, **besoin** → **bezoni\***, **blason** → **blazono°**, **devise** → **devizo\*** (ruse **девиз**, pole **dewiz**), **désirer** → **deziri\***, **frénésie** → **freneza\***, **friser** → **frizi\***, **gris** → **griza\***, **isoler** → **izoli\***, **jesuite** → **jezuito°**, **camisole** → **kamizolo\***, **écluse** → **kluzo\***, **cotiser** → **kotizi°**, **cousin** → **kuzo\***,

magasin → magazeno\*, mesure → mezuri\*, myosotis → miozoto\*, Paris → Parizo\*, partisan → partizano°, paysage → pejzaĝo\*, poser → pozi°, raser → razi\*, raisonner → rezoni°, rusé → ruza\*, saison → sezono\*, trésor → trezoro\*, valise → valizo\*, visage → vizaĝo\*, visièere → viziero\*, visiter → viziti\*.

Tio estas konforma al la franca prononco de la *s*, kiu ĝenerale estas elparolata [z] kiam ĝi troviĝas inter du vokaloj. Ĉi tie la fonetismo havas la prioritaton.

La verbo *peser* donis du formojn iom similajn: *pesi\** kaj *pezi\**.

**SS [s] → S:**

*fracasser* → *frakasi\**, *passer* → *pasi\**, *tousser* → *tusi\**.

**U [ü] → U, aŭ tute escepte I:**

**U:** *amuser* → *amuzi\**, *brochure* → *broŝuro°*, *brûler* → *bruli\**, *buffet* → *bufedo\**, *éduquer* → *eduki\**, *embuscade* → *embusko\**, *ennui* → *enui\**, *coqueluche* → *kokluŝo\**, *suffoquer* → *sufoki\**, *tulle* → *tulo\**.

**I:** *jusque* → *ĝis\**.

#### IV. VORTOJ EL ITALA FONTO

Ili estas tre malmultaj pro tio, ke Zamenhof verŝajne ne havis fluan scion de la itala lingvo. Kaj ofte ili estas depruntitaj pere de alia lingvo.

**C antaŭ e, i [ĉ] → Ĉ:**

*cicerone* → *ĉiĉerono°*, *vermicello* → *vermiĉelo\**, *violoncello* → *violonĉelo\**.

**CCI sekvata de vokalo [ĉĉ] → Ĉ:**

*pagliaccio* → *pajaĉo°*, *pasticcio* → *pasteĉo\**.

**G sekvata de e, i [ĝ] → Ĝ:**

*doge* → *doĝo°*.

**GGI sekvata de vokalo [ĝĝ] → Ĝ, aŭ Ĝ:**

**Ĝ:** *appoggiare* → *apogi\**.

**Ĝ:** *arpeggio* → *arpeĝo°*.

**GLI [lj] → J:**

*pagliaccio* → *pajaĉo°*.

**GN [nj] → NJ:**

*signore* → *sinjoro\**.

**S intervokala [z] → Z:**

*grandioso* → *grandioza°*, *virtuoso* → *virtuozo\**.

**SCH [sk] → SK:**

*scherma* → *skermi\**, *schizzo* → *skizi\**.

**Z [dz] → C:**

*cadenza* → *kadenco°*, *Tiziano* → *Ticiano°*, *Venezia* → *Venecio°*.

## V. VORTOJ EL HISPANA-PORTUGALA FONTO

Ili estas same malmultaj kiel la italaj vortoj, pro la sama kaŭzo. Temas ĉefe pri propraj nomoj.

C [š] antaŭ e, i → C:

Barcelona → Barcelono°, centavo → centavo°.

La vorto Andaluzio° venas verŝajne de la franca **Andalousie** kaj ne de la hispana **Andalucía**.

CH [ĉ] → Ĉ:

Chili → Ĉilio°.

EI (portugala) [ej] → EJ:

Madeira → Madejro°.

GU sekvata de a, o, u [gw] → GV, aŭ GU:

GV: Paraguay → Paragvajo°.

GU: guano → guano°.

Sed sekvata de e, i, la hispana **gu** estas elparolata [g]. Do **guerilla** devus doni gerilo kaj ne gverilo.

J [ĥ] → Ĥ, aŭ J:

Ĥ: Quijote → Kiĥoto°, Taje → Taĥo°.

J: Juan → Ĵuano° (laŭ la franca prononco de la vorto).

LL [lj] → L:

Castilla → Kastilo°, mantilla → mantilo°.

Same, Kalocsay kreis la vorton kaŭdilo, el la hispana **caudillo**.

Ñ [nj] → N:

vicuña → vikuno°.

QU sekvata de e, i [k] → K:

Quijote → Kiĥoto°.

S intervokala (hispane) [s] → Z:

peseta → pezeto°.

Tio estas konforma, ne al la hispana prononco, sed al la franca-itala-portugala.

S intervokala (portugale) [z] → Z:

Lusiadas → Luziado°.

Z [š] → Z:

mestizo → mestizo°.

## VI. VORTOJ EL GERMANA FONTO

Ä [ɛ] → A, aŭ E:

A: schätzen → ŝati\*.

E: sägen → segi\*.

AU [aŭ] → AŬ:

bedauern → bedaŭri\*, dauern → daŭri\*, Haut → haŭto\*, Laube → laŭbo\*,  
 laut → laŭte\*, Raupe → raŭpo\*, Schaum → ŝaŭmo\*, Schraube → ŝraŭbo\*,  
 taugen → taŭgi\*, zausen → taŭzi\*.

ÄU [øj] → AŬ:

Fräulein → fraŭlino\*.

CH [h] → Ĥ, aŭ K, malofte H, aŭ Ĉ:

Ĥ: Bacharach → Baĥarafi\*, München → Munĥeno\*, Zurich → Zurifi\*o.

K: Fach → fako\*, Kuchen → kuko\*, Tuch → tuko\*.

H: Kachel → kahelo\*.

Ĉ: Pech → peĉo\* (angle pitch).

La germana ch estas prononcata pli forte kiam ĝi sekvas la vokalojn a, o, u; pli dolĉe kiam ĝi sekvas la vokalojn ä, e, i, ö, ü, aŭ konsonanton.

CHS [ks] → KS:

Wachs → vakso\*, wachsen → vaksi\* (signifis «kreski» en la rusa eldono de la Unua Libro).

CK [k] → K:

dick → dika\*, flicken → fliki\*, hacken → haki\*, jucken → juki\*, lecken → leki\*,  
 packen → paki\*, Zucker → sukero\*, wecken → vekti\*.

EI aŭ AI [aj] → AJ, aŭ EJ:

AJ: ein → ajn\*, pfeifen → fajfi\*, feilen → fajli\*, Main → Majno\*,  
 Meister → majstro\*, reiten → rajdi\* (angle ride), scheinen → ŝajni\*.

EJ: Heim → hejmo\*, heizen → hejti\*, Ilsenstein → Ilzenŝtejno\*, Leipzig  
 → Lejpcigo\*, Meile → mejlo\*, Rhein → Rejno\*.

La transskribo de la germana ei respondas jen al la grafismo, jen al la fonetismo.

-EL fina kaj senakcenta → -EL akcentita, aŭ -L, aŭ nenio:

EL: Zirkel → cirkelo\*, Fabel → fabelo\*, Juwel → juvelo\*, Kittel → ki-  
 telo\*, Mantel → mantelo\*, Paddel → padelo\*, Pudel → pudelo\* (ruse ny-  
 дель, pole pudel), siegeln → sigeli\*.

L: jodeln → jodli\*, Kegel → keglo\*, Kugel → kuglo\*, Möbel → meblo\*,  
 Pantoffel → pantoflo\*, pökeln → pekli\*, Riegel → rigli\*, Waffel → vaflo\*.

nenio: Furunkel → furunko\*, Kringel → kringo\*, schimmeln → ŝimi\*,  
 Schindel → ŝindo\*.

-EN fina kaj senakcenta → -EN akcentita, aŭ nenio:

EN: Antwerpen → Antverpeno\*, Bremen → Bremeno\*, Dresden → Dres-  
 deno\*, eben → ebena\*, Faden → fadeno\*, Hohenstaufen → Hohenŝtaŭfe-  
 noj\*, München → Munĥeno\*, Orden → ordeno\*, Posten → posteno\*, Rie-  
 men → rimeno\*, Wiesbaden → Visbadeno\*.

nenio: Batzen → baco\*, Graubünden → Graŭbindo\*, Groschen → groŝo\*,  
 Nibelungen → Nibelungoj\*.

-ER fina kaj senakcenta → -ER akcentita, aŭ -R, aŭ nenio:

ER: Butter → butero\*, Ziffer → cifero\*, Kellner → kelnero\*, Kreuzer →  
 krejcero\*, Luther → Lutero\*, Makler → makleri\*, Sommer → somero\*,  
 Teller → telero\*, Zucker → sukero\*, Wetter → vetero\*.

R: Finger → fingro\*, Hamster → hamstro\*, Junker → junkro\*, Meister →  
 majstro\*, Schulter → ŝultro\*, Tornister → tornistro\*, Winter → vintro\*.

nenio: Glimmer → glimo\*, Keller → kelo\*, Klafter → klafto\*, Leder →

ledo\*.

EU [øj] → EJ:

Kreuzer → krejcerō (ruse крейцер).

H → H:

hacken → haki\*, Haar → haro\*, Heim → hejmo\*, heizen → hejti\*, hell → hela\*, Hund → hundo\*.

I → U (malofte):

dingen → dungi\*, spritzen → ŝpruci\*.

IE [i] → I, aŭ E, aŭ IE, aŭ U:

I: Kiel → kilo\* (france quille, ruse киль), Offizier → oficio\*, Pionnier → pioniro\*, Riegel → rigli\*, Riemen → rimeno\*, siegeln → sigeli\*, schmieren → ŝmiri\*, Turnier → turniro\*, Vezier → veziro\* (pole wezyr).

E: Kien → keno\*.

IE: Miene → mieno\*, Wien → Vieno\* (france Vienne).

U: fliegen → flugi\* (la u respondas al la old-norvega fljúga).

-IG fina [ik] → IG, aŭ malofte IK:

Leipzig → Lejpcigo\* kaj Lepsiko\*, Ludwig → Ludvigo\*, Pfennig → pfenigo\*.

-IN → -EN:

Rabbiner → rabeno\* (france rabbin, ruse раввин, pole rabin), Rosmarin → rosmareno\*, Rubin → rubeno\*.

J → J:

ja → ja\*, Jacke → jako\*, Jahr → jaro\*, je → je\*, jucken → juki\*.

Ö [ö] → E, aŭ O, aŭ U:

E: blöken → bleki\*, Föhn → feno\*, Möbel → meblo\* (france meuble, ruse мебель, pole mebel), Möwe → mevo\*, pökeln → pekli\* (pole peklować).

O: Börse → borso\* (sed ĝi povas veni ankaŭ de la franca bourse).

U: löten → luti\* (ankaŭ pole lutować).

PF → F, aŭ PF, aŭ P:

F: pfeifen → fajfi\*, pflegen → flegi\*, Pfosten → fosto\*, Pfund → funto\*, pfuschen → fuŝi\*, Strumpf → ŝtrumpo\*.

Tio estas evidenta influo de la jida lingvo, en kiu oni trovas פייפּען *fajfen* «fajfi», פּלענערן *flegen* «flegi», פונט *funt* «funto», פּוּשען *fusen* «fuŝi».

Ekzistas ankaŭ slava influo: ruse фунт, pole funt «funto».

PF: Pfennig → pfenigo\*.

P: Kropf → kropo\* (aŭ de la angla crop), Pflügen → plugi\* (angle plough), schrumpfen → ŝrumpi\*, stopfen → ŝtopi\* (angle stop).

S silabkomenca [z] → S, aŭ Z:

S: sägen → segi\*, senden → sendi\*, siegeln → sigeli\*, Sommer → somero\*.

Z: Almosen → almozo\*, Ilsenstein → Ilzenŝtejno\*, zausen → taŭzi\*, Samenhof → Zamenhof\*, sorgen → zorgi\*, summen → zumi\*.

SCH [ŝ] → Ŝ:

dreschen → draŝi\* (la a venas de la angla thrash), Fisch → fiŝo\*, pfuschen → fuŝi\*, Groschen → groŝo\* (ruse ррow, pole grosz), Masche →

maŝo\*, Schaf → ŝafo\*, scheinen → ŝajni\*, schätzen → ŝati\*, Schaum → ŝaŭmo\*, scherzen → ŝerci\*, Schild → ŝildo\*, Schiller → ŝillero\*, schimmeln → ŝimi\*, Schindel → ŝindo\*, Schinken → ŝinko\*, schirmen → ŝirmi\*, Schloß → ŝlosi\*, schmatzen → ŝmaci\*, schmieren → ŝmiri\*, Schnur → ŝnuro\*, Schrank → ŝranko\*, Schraube → ŝraŭbo\*, Schuh → ŝuo\*, schulden → ŝuldi\*, Schulter → ŝultro\*, schweben → ŝvebi\*, schwellen → ŝveli\*, schwitzen → ŝviti\*, wischen → viŝi\*.

SP [ŝp] → **ŜP**, aŭ escepte **SP**:

**ŜP**: sparen → ŝpari\*, spinnen → ŝpini\*.

**SP**: Spalier → spaliro\*.

B aŭ SS [s] → **S**:

Amboß → amboso\*, Floß → flosa\*, Schloß → ŝlosi\*.

ST [ŝt] → **ŜT**, aŭ pli malofte **ST**:

**ŜT**: Frühstück → friŝtiko\*, Ilsenstein → Ilzenŝtejno\*, Stahl → ŝtalo\*, Staat → ŝtato\* (ruse *штат*), stehlen → ŝteli\*, Stoff → ŝtofo\*, Stein → ŝtono\* (influo de la angla *stone*), stopfen → ŝtopi\*, Strumpf → ŝtrumpo\*, Stufe → ŝtupo\* (angle *step*).

**ST**: Hohenstaufen → Hohenŝtaŭfenoj\*, Stab → stabo\*, Stange → stango\*, steppen → stebi\*, Strike → striko\*.

Plej ofte, la transskribo de la germanaj *sp* kaj *st* estas konforma al ilia prononco.

TZ [c] → **C**, aŭ **T**:

**C**: Batzen → baco\*, Matze → maco\* (ruse *маца*, hebree *מַצָּה*), Matratze → matraco\*, schmatzen → ŝmaci\*, spritzen → ŝpruci\*.

**T**: schätzen → ŝati\*, schwitzen → ŝviti\*.

Ü [ü] → **U**, aŭ tute escepte **I**:

**U**: früh → frue\*, Lübeck → Lubeko\*, München → Munĥeno\*, pflügen → plugi\* (sed la etimo povas esti ankaŭ la angla *plough*), schütten → ŝuti\*, Türkis → turkiso\*, Volapük → Volapuko\*.

**I**: Frühstück → friŝtiko\*, Graubünden → Graŭbindo\*.

Nekutima ŝanĝo de la sono [ü] al la sono [i], tuta malsama. Ĝi estas verŝajne ŝuldata al la influo de la jida lingvo, kiu transskribas la germanan vokalon *ü* per la sono [i]; ekzemple פִּיר *fir* «por», germane *für*; תּוּר *thir* «pordo», germane *Tür* (antaŭe *Thür*). Cetere, la populara franca vorto *frichti* «kuiritaĵo» venas same de la germana *Frühstück*.

V [f] → **F**:

Verdeck → ferdeko\*.

Z [c] → **C**, aŭ malofte **T**, aŭ **Z**:

**C**: Ziffer → cifero\* (angle *cipher*, ruse *цифра*, pole *cyfra*), Zirkel → cirkelo\*, Zoll → colo\* (pole *cal*), Leipzig → Lejpcigo\*, Marzipan → marci-pano\*, Offizier → oficiro\*, Porzellan → porcelano\*, scherzen → ŝerci\*.

**T**: Pelz → pelto\*, zausen → taŭzi\*.

**Z**: Zurich → Zurifo\*.

## VII. VORTOJ EL ANGLA FONTO

A [ɛ] → E, aŭ A:

E: ale → elo°, Cambridge → Kembriĝo°, Shakespeare → Ŝekspiro°, wake → vekio\*.

A: have → havi\*, lame → lama\* (germ. lahm), save → savi\*.

AI [e] → AJ, aŭ E:

AJ: hail → hajlo\*, nail → najlo\*, tailor → tajloro\*, train → trajno°.

E: drain → dreni°, curtain → kurteno\*, rail → relo\*.

AW [aŭ] → AŬ:

lawntennis → laŭntenisio°.

C [s] → C:

spice → spico\*.

CH [ĉ] → Ĉ:

chamber → ĉambro\*, Chicago → Ĉikago°, chirp → ĉirpi°, punch → punĉo\*.

EA [ɛ] aŭ [ë] → E:

E: learn → lerni\* (germ. lernen), pleasure → plezuro\*, search → serĉi\*, weather → vetero\*.

EA [i] → E, aŭ A, aŭ I:

E: appear → aperi\*, knead → knedi\*, streak → streki\*.

A: eagle → aglo\* (influo de la franca aigle, latina aquila), bream → braĉmo\*.

I: Shakespeare → Ŝekspiro° (ruse Шекспир).

EE [i] → E:

roastbeef → rostbefo°, spleen → spleno°.

En ĉi tiuj vortoj, gravas la grafismo, ne la prononco.

-ER fina kaj senakcenta → -ER akcentita, aŭ -R, aŭ nenio:

ER: butter → butero\*, cipher → cifero\*, letter → letero\*, deliver → liveri\*, summer → somero\*, weather → vetero\*.

R: buffer → bufro°, chamber → ĉambro\*, finger → fingro\*, master → mastro\*, plaster → plastro\* (germ. Pflaster, ruse пластырь, pole plaster), winter → vintro\*.

nenio: glimmer → glimo\*.

G aŭ DG [ĝ] → Ĝ, aŭ G:

Ĝ: Cambridge → Kembriĝo°, scourge → skurĝo\*.

G: strange → stranga\*, sturgeon → sturĝo\*.

GU antaŭ e, i [g] → G:

guinea → gineo°.

H [h] → H:

have → havi\*, help → helpi\*, hook → hoko\*.

I [ë] → I:

bird → birdo\*, flirt → flirti\*.

La prononco de birdo aŭ de flirti havas nenion komunan kun la prononco de la anglaj etimoj. Tio montras ankoraŭfoje, ke gravas pli la grafismo ol la fonetismo.

I aŭ Y [aj] → **AJ**, aŭ **I**:

**AJ**: Byron → Bajrono°, file → fajli\*, fire → fajro\*, ride → rajdi\*, tide → tajdo°.

**I**: spite → spite\* (ebla influo de la franca *dépit*), strike → striko\*.

IGH [aj] → **AJ**:

nightingale → najtingalo\*, right → rajto\*.

Ĉe tiuj ĉi du lastaj kategorioj, la esperantaj vortoj entenantaj aj respeguligas la fonetismon, ne la grafismon.

IN → **EN**:

ermine → ermeno\*.

J [ĝ] → **Ĝ**:

joy → ĝoji\*.

OO [u] → **U**, aŭ **O**:

**U**: arrowroot → aroruto°, foot → futo\* (ruse *фут*).

**O**: hook → hoko\*.

OW [ō] → **O**, aŭ **AŬ**:

**O**: arrowroot → aroruto°, drown → droni\*. Vidu ĉi-poste **W**.

**AŬ**: clown → klaŭno°.

SH [ŝ] → **Ŝ**, aŭ malofte **Ĉ**:

**Ŝ**: bushel → buŝelo\*, fish → fiŝo\*, fresh → freŝa\*, push → puŝi\*, shalm → ŝalmo\*, shark → ŝarko\*, Shakespeare → Ŝekspiro°, shell → ŝelo\*, she → ŝi\*, ship → ŝipo\*, shove → ŝovi\*, showel → ŝoveli\*, shoe → ŝuo\*.

**Ĉ**: marsh → marĉo\*.

TCH [ĉ] → **Ĉ**:

butcher → buĉi\*, stretch → streĉi\*.

TH [ĝ] → **T**:

weather → vetero\* (germane *Wetter*).

W [w] → **V**:

blow → blovi\*, bowl → bovlo°, brow → brovo\* (ankaŭ rusa *бровь*), swing → svingi\*, showel → ŝoveli\*, swell → ŝveli\*, wax → vakso\*, warm → varma\*, Washington → Vaŝingtono\*, wake → vekti\*, weather → vetero\*, wind → vindi\*, winter → vintro\*, whip → vipo\*, wound → vundi\*.

Zamenhof neniam uzis ŭ por transskribi la anglan **w**. Ekzistas nur tre malmulte da zamenhofaj vortoj kun silabkomenca ŭ: la onomatopeoj kŭaks°, ŭa° kaj ŭaks°.

Krom tiuj vortoj, en la zamenhofa leksiko, la ŭ utilas nur en la diftongoj aŭ, eŭ.

Y [j] → **J**:

year → jaro\*, yes → jes\*.

## VIII. VORTOJ EL RUSA FONTO

В fina [f] → **V**:

Харьков → Ĥarkovo°, Киев → Kievo°, Саратов → Saratovo°.

Kvankam la rusa **v** ĉe fino de vorto estas prononcata [f], Zamenhof transskribis ĝin

per v, kio konformas al la grafismo, ne al la fonetismo.

ГВ → GV:

гвардия → gvardio\* (pole gwardia).

Е [je, e] → E, aŭ malofte JE:

Е: бекеша → bekeŝo°, четверик → četveriko°, десятина → desatino°, Днепр → Dnepro°, гарнец → garneco°, кларнет → klarneto\* (pole klar-net), Кремль → Kremlo°, непременно → nepre\*, Одесса → Odeso°, Петербург → Peterburgo°, верста → versto\*, вершок → verŝoko°.

JE: Белосток → Bjelostoko° (pole Białystok), есаул → jesaulo°, Николаев → Nikolajevo°, Немен → Njemeno°, воевод → vojevodo°.

Oni vidas, ke ĝenerale la transskribo de la e rusa al je estis uzata de Zamenhof kiam la e troviĝas ĉe la komenco de vorto, aŭ kiam ĝi sekvas alian vokalon. En la aliaj kazoj, ĝi estas transskribita per simpla e. Esceptoj tamen estas Bjelostoko kaj Njemeno, kio montras, ke Zamenhof ne havis precizan penson pri tio.

Oni tamen konkludu, ke vortoj kiel Sovjeto, Bjeloruso, pjerestrojko, estas malĝuste faritaj. Zamenhof uzis «sovjet» (Rabeno, p.60), sed kiel interkrampan vorton neasimilitan.

*Nota.* Dum la vivo de Zamenhof, la rusa alfabeto entenis ankaŭ la vokalon Ъ, kiu havis ekzakte la saman valoron kiel la e, kaj estis transskribita same. Kaj la vokalo Ъ ĉe la fino de la vortoj havis nenian prononcon, do ne estis transskribita.

Ё [jo] → JO, aŭ E:

Пётр → Pjetro°, Алёша → Aleĉjo\*.

Й [j] → J:

сайка «bulko» → sajko°.

En kopeko° (ruse копейка), la й tute malaperas.

Oni notu, ke la slava vorto por Ukraino ne entenas tiun literon, sed ordinaran i akcentitan: ruse Україна, ukraine Україна. Rezultas, ke «Ukrajno» estas vorto tute ne konforma al la etimo.

Н секвата de mola vokalo [nj] → NJ:

Маня → Manjo\*.

Х [h] → K, kelkfoje H:

К: барахтаться → barakti\*, хлопотать → klopodi\* (pole kłopotać), хрен → kreno\*, шах → ŝako\*.

H: хан → ĥano° (arabe خان).

Ц [c] → C:

целиться → celi\* (germane zielen, pole celować), канцелария → kancelario\*, маца → maso\* (hebree מצה).

Ч [ĉ] → Ĉ:

черпать → ĉerpi\* (pole czerpać), четверик → četveriko°, калач → kalaĉo°.

Ш [ŝ] → normale Ŝ, kelkfoje ĈJ, aŭ Ĉ:

Ŝ: аршин → arŝino°, башкир → baŝkiro°, башлык → baŝliko°, бекеша → bekeŝo°, шах → ŝako\*, вершок → verŝoko°.

ĈJ: Алёша → Aleĉjo\*, Миша → Miĉjo\*.

Ĉ: каша → kaĉo\* (pole kasza).

La transskribo Ĉj estas trovebla nur ĉe la sufikso -Ĉjo.

Щ [ŝĉ] aŭ [ŝŝ] → Ĉ:

борщ → barĉo\* (pole barszcz).

Tio estas eble aparta kazo, el kiu oni ne starigu ĝeneralan regulon.

Ы → I:

башлык → baŝliko\*.

Ь [j] → nenio:

Харьков → Ĥarkovo\*, киль → kilo\* (france quille, germane Kiel), Кремль → Kremlo\*, ваниль → vanilo\* (france vanille).

La rusa litero ь moligas la antaŭan konsonanton.

Я [ja] → JA, aŭ escepte A:

JA: Ялта → Jalto\*, Ява → Javo\* (kiu povas veni nur de la rusa Ява aŭ de la germana Java, ĉar internacie oni prononcas plej ofte [ĵava] aŭ [ĝava]), урядник → urjadniko\*.

A: десятина → desatino\*.

## IX. VORTOJ EL POLA FONTO

La vortoj de deveno pure pola estas maloftaj. Plej ofte ili estas de deveno samtempe pola kaj rusa.

CH [ĥ] → Ĥ:

Chiny → Ĥino\* (formo ne internacia, kaj prave anstataŭigita nun per Ĉino).

CZ [ĉ] → Ĉ:

czepaĉ → ĉerpi\* (ruse черпать), czy → ĉu\*.

Ó [u] → O:

Kraków → Krakovo\*.

Ankoraŭfoje gravas la grafismo, ne la fonetismo.

ŚĆ → ŜT:

mość → moŝto\*.

SZ [ŝ] → Ŝ, aŭ Ĉ:

Ŝ: szelki → ŝelko\*.

Ĉ: kasza → kaĉo\* (ruse каша).

SZCZ [ŝĉ] → Ĉ:

barszcz → barĉo\* (ruse борщ).

W fina [f] → V:

Kraków → Krakovo\*.

La pola w ĉe fino de vorto estas prononcata [f], ekzakte kiel la v ĉe la fino de la rusaj vortoj. En ambaŭ kazoj, Zamenhof respektis la grafismon.

## X. VORTOJ EL HEBREA FONTO

Ili estas malmultaj kaj koncernas nur judajn aferojn, aŭ izraelajn lokojn aŭ homojn.

**ב** [b] aŭ [v] → **B**:

**אָבִימֶלֶךְ** *āvīméleĥ* → Abimeleĥo°, **אַבְרָהָם** *avraham* → Abrahamo°, **בָּבֶל** *bavel* → Babel°, **הָבֵל** *hável* → Habelo°, **חֶבְרוֹן** *hevrōn* → Hebrono°, **חֹרֵב** *hōrev* → Horebo°, **יַעֲקֹב** *ya'āqov* → Jakob°, **כְּרֻב** *kērūv* → kerubo\*, **כִּיּוֹב** *kivra* → kibro°, **לָבָן** *lavan* → Labano°, **לְבָנוֹן** *lēvanōn* → Lebanono°, **מוֹאָב** *mōav* → Moabo°, **מִטְ לַבֵּן** *mūt labben* → mut-labeno°, **רְאוּבֵן** *rēūven* → Ruben°, **תָּבוֹר** *tavōr* → Taboro°, **זְבוּלוֹן** *zēvūlōn* → Zebulon°.

Kiam vokalo troviĝas antaŭ ĝi, tiu litero estas skribita **ב** kaj elparolata [v], aŭ skribita **ב** kaj elparolata [bb]. Kiam vokalo ne antaŭas ĝin, ĝi estas skribita **ב** kaj elparolata [b]. En ĉiuj kazoj, Zamenhof ĉiam transskribis ĝin b, kiel faras ankaŭ la lingvoj latina kaj helena.

**ה** [h] → **H**:

**הַגָּדָה** → hagado°, **הָרֵן** → Harano°, **הִלֵּל** → Hilelo°, **כֹּהֵן** → koheno°.

**ו** [v] (sed antikve [w]) → **V**:

**בַּר-מִצְוָה** → bar-micvo°, **עֵשָׂו** → Esavo°, **חַוִּילָה** → Havila°, **לֵוִי** → Levi°.

**ח** [h] → **A**, kelkfoje **H** (verŝajne pro eraro):

**A**: **גִּיחוֹן** → Gifion°, **חָם** → Ham°, **חָרָן** → Harano°, **חַוִּילָה** → Havila°, **חֶבְרוֹן** → Hebrono°, **חֶדֶר** → ĥedero°, **חֵת** → Ĥet°, **חִדְקֵל** → Ĥidekel°, **חֹמֶר** → ĥomero°, **חֹשֶׁן** → ĥoŝeno°, **יְרִיחוֹ** → Jeriĥo°, **קֹרַח** → Koraho°, **מַחֲלַת** → maĥalato°, **נַחֲוֹר** → Naĥor°, **פִּינְחָס** → Pineĥaso°, **רַחֵל** → Raĥel°. **H**: **חֲנוּךְ** → Henoĥ°, **חֶרְמוֹן** → Hermono° (la Londona Biblio prave korektis: Ĥanoĥ, Ĥermono).

**י** [in] → **-EN**:

**בְּנֵימִין** → Benjamenino°.

**כ** [k] aŭ [h] → **K**, aŭ **A**:

**K**: **מִיֵּתָם** *miĥtam* → miktamo°.

**A**: **אָבִימֶלֶךְ** *āvīméleĥ* → Abimeleĥo°, **חֲנוּךְ** → Henoĥ°, **יִשְׂשַׁכָּר** → Isaĥaro°, **לָמֶךְ** → Lameĥo° (Londona Biblio: Lemeĥ).

Kiam vokalo troviĝas antaŭ ĝi, tiu litero estas skribita **כ** kaj elparolata [h], aŭ skribita **כ** kaj elparolata [kk]. Kiam vokalo ne antaŭas ĝin, ĝi estas skribita **כ** kaj elparolata [k]. Kiam ĝi egalvaloras [h], Zamenhof transskribis ĝin k aŭ fi.

**צ** [c] → **C**:

**בַּר-מִצְוָה** → bar-micvo°, **צִלָּה** → Cila°, **צִיּוֹן** → Ciono° (malgraŭ la latina Sion; sed oni trovas sionismo°), **מַצָּה** → maco\* (germ. Matze, ruse маца).

**ש** [s] → **S**, aŭ kelkfoje **S**:

**S**: **יִשְׁמָעֵאל** *yiŝmael* → Iŝmaelo°, **פִּישׁוֹן** → Piŝono°, **שֵׁם** → Ŝem°, **שְׂאוּל** → Seolo°.

S: אֵנוֹשׁ → Enos° (la Londona Biblio havas pli ĝuste Enoŝ), מֹשֶׁה → Moseo°, שֵׁת → Set° (latine Seth), שִׁחֵם → Siĥemo° (latine Sichem; la Londona Biblio korektis en Ŝeĥemo).

La vortoj Izraelo°, Jeruzalemo°, Jozefo°, ne venas de la respektivaj hebreaj vortoj יִשְׂרָאֵל *yisrael*, יְרוּשָׁלַיִם *yērūšaláyim*, kaj יוֹסֵף *yōsef*, sed de ilia pola traduko: Izrael (ruse Израиль), Jeruzalem, Józef (cetere, la Londona Biblio korektis prave Jeruzalemo° en Jerusalem). Same, Salomono° kaj Samuelo° venas de la latinaj Sālōmōn kaj Sāmūēl, kaj ne de la hebreaj שְׁלֹמֹה *šēlomō* kaj שְׁמוּאֵל *šēmūel*.

## XI. VORTOJ EL SANSKRITA FONTO

Mi trovis nur tre malmulte da zamenhofaj vortoj senkonteste de sanskrita deveno. La vorto sanskrito° venas fakte de la eŭropa formo de संस्कृत *saṅskṛta*: sanscrit, санскрит. Himalajo° (हिमालय *himālaya*) ne estigas fonetikajn problemojn. Gango° venas tre simple de la sanskrita गङ्गा *gangā*; sed Zamenhof uzis ankaŭ la formon Gangeso°, el la angla Ganges. Nur la nomo de Buddo° ne estas tiel facile esperantigebla. Ĝia sanskrita formo estas बुद्ध *buddha*, kio estigas tri problemojn: ĉu konservi la finan a? ĉu konservi la duoblan d? ĉu konservi la h? Laŭ la respondo farita al tiuj tri demandoj, oni ricevas plurajn formojn: Zamenhof kaj aliaj uzis Buddo, la PIV aldonas Budao kaj Budho, la korea vortaro de Hajpin Li aldonas Buddho, kaj Kofmann uzis pli simple Budo. Ĉar la nombro de la eblaj formoj estas la tria potenco de du, t.e. ok, mankas do Buddao, Budhao, Buddhao. Zamenhof ne klarigis sian penson; li nur elektis Buddo. Ĉu eblas eliri el tiu kaĉo? Bedaŭrinde ne facile.

- 1) Konservo aŭ ne de la fina a. La konservo de la a havas kiel malavantaĝon, ke la vorto budaismo entenas la hiaton ai, iom ŝokan, kaj ne troveblan en la internacia formo de tiu vorto. Plie, la konservo de nacilingva finaĵo antaŭ la esperanta finaĵo ne estas kutima: oni ja ne diras «Annao», sed Anno aŭ Anna. Tamen tio ne estas kontraŭfundamenta: la vorto manao\* venas ne de la hebrea מָן *man*, kiu ne entenas vokalon a, sed de la germana Manna, rusa манна, pola manna, kiuj venas de la latina manna; ĝi kunigas do la latinan finaĵon -a kaj la esperantan finaĵon -o. Do, Budao, Buddao, Budhao, Buddhao, ne kontraŭas la Fundamenton.
- 2) Konservo aŭ ne de la duobla d. Oni baldaŭ vidos, ke ankaŭ duobla konsonanto ne estas kontraŭfundamenta, se tiu duobleco estas utila. Ĉi tie, ĝia utileco estus nur la evito de konfuzo kun la vorto budo «malgranda konstruaĵo», sed tre verŝajne la kunteksto sufiĉas por forigi ĉian konfuzon, kaj se oni uzas la formon kun h, la konfuzo ne plu eblas. Tamen, Buddo, Buddao, Buddho, Buddhao, ne estas kontraŭfundamentaj.
- 3) Konservo aŭ ne de la h. Tiu ĉi problemo estas pli tikla. Sur paĝo xviii de la

PIV, G. Waringhien skribas: «mi ne povas akcepti la konservadon de h post konsonanto, kio ŝajnas al mi kontraŭa al la kutimoj de nia lingvo. Kial Esperanto devus malrespekti sian tradician ortografion favore al la Hindoj, dum ĝi rifuzas tion fari por la Hebreoj, Helenoj, ktp? Se ni skribas, laŭ Zamenhof, Prometeo aŭ Tiesto [...], lasante fali la h, mi ne vidas motivon por ĝin savi ĉe Amitabho aŭ Ĝhanoj».

Ĉi tiu teksto entenas bedaŭrindan konfuzon inter du aferoj tute mal-samaj.

a) Oni ne scias precize, kia estis la sono de la helena  $\Theta$ . Eble ĝi havis la sonon [ŝ], t.e. la sonon de la angla **th**, ekzemple en **North**, aŭ de la hispana **z**, ekzemple en **zarzuela**, aŭ de la islanda **þ**, ekzemple en **þakka**. Ĝi daŭre havas tiun sonon en novgreka. Ĉar multaj lingvoj malhavas tiun sonon, ili transskribas tiun  $\Theta$ , ĉu per simpla **t** (tiel faras la itala, la hispana, la pola, k.a.), ĉu per la dulitero **th** (tiel faras la franca, la germana, k.a.), sed prononcata [t]. En tiu ĉi kazo, la **th** estas nur ortografia afero: ne ekzistas prononca diferenco inter la franca **thé** «teo» kaj la hispana **té** «teo». Ankaŭ Esperanto malhavas tiun sonon [ŝ]; do tute logike ĝi imitas la italan, hispanan, polan, kaj uzas **t**. Ekzistas efektive neniu kaŭzo por skribi «Prometheo» laŭ la maniero latina, franca, angla.

Pro simila motivo, la greka  $\Phi$  pasis al **f**. Do ankaŭ ne estus kaŭzo por skribi «phosphoro» kun **ph** anstataŭ **f**.

b) Tute male, la sanskrita litero **थ** *tha* tute ne havas la sonon [ŝ], sed la sonon [th]. Ekzakte kiel en **plathelmintoj** (PIV, p.381 kaj 385). Same la **भ** *bha* havas la sonon [bh], la **ख** *kha* ne havas la sonon [ĥ], sed [kh] (kiel la tibeta **ཀ**, la kamboĝa **ខ**, ktp), la **घ** *gha* havas la sonon [ĝh], la **फ** *pha* havas la sonon [ph], kiel en **lipharoj**, ktp. Do kial la duobla sono **ph** ne estus skribita **ph**, kiuj estas du esperantaj fonemoj? Ni ja skribas tion senprobleme en **lipharoj**. Oni trovas **Lhaso** en la PIV, kaj **mirho\*** (h post konsonanto) estas eĉ Fundamenta vorto. Do, spite la aserton de la PIV, ekzistas grava kaŭzo por transskribi **अमिताभ** per **Amitabho**; cetere tion faris Tibor Sekelj, kiu sciis la prononcon de la hinda lingvo. Kaj ankaŭ la PIV en la vorto **Budho**, farita tre logike kaj laŭfundamente. Oni certe rajtas skribi **Amitabo**, **Barato**, **darmo**, ktp, anstataŭ **Amitabho**, **Bharato**, **dharmo**, sed tio ne estas por respekti la tradician ortografion de Esperanto, tio estas nur por simpligi la prononcon kaj doni eŭropan aspekton al aziaj nomoj, kio estas eble kritikinda.

c) Oni konkludu, ke **Budho**, **Budhao**, **Buddho**, **Buddhao**, estus eblaj. Mi ja skribis, ke la zamenhofa penso ĉi-rilate ne ĉiam estas preciza.

## XII. LA VIRINAJ NOMOJ

En Esperanto, gramatika genro ne ekzistas. Do en la Fundamento, la virinaj nomoj havas la komunan substantivan finaĵon **-o**, same kiel la viraj nomoj: **Anno\***, **Berto\***, **Elizabeto\***, **Emilio\***, **Henrieto\***, **Klaro\***, **Mario\***, **Sofio\***.

Ankaŭ en la zamenhofa traduko de la Biblio, oni trovas la nomon Evo°, dum la Londona Biblio preferas la formon Eva.

Ne Fundamenta estas do la nun tre disvastigita finaĵo -a por la virinaj nomoj, sed ĝi estas centprocente zamenhofa, ĉar Zamenhof uzadis ĝin tre ofte: Ada°, Angelika°, Cila°, Dina°, Eliza°, Lea°, Marta°, Naama°, Rebeka°, Sara°, ktp.

### XIII. LA DUOBLAJ KONSONANTOJ

La **duoblaj konsonantoj** de la fontovortoj ĝenerale ne estas konservataj. «*En Esperanto oni aŭdas duoblajn konsonantojn nur en kunmetitaj vortoj (ekz.: huffero, ellerni), kaj en kelkaj propraj nomoj (ekz.: Anna)*» (PIV, p.555). Efektive, ili plej ofte malsimpligas la ortografion de lingvo, ne alportante ion al la informado. Por kelkaj Francoj nur duonkleraj, vera kaprompo estas la enmemorigo ke **apparaître** «aperi» entenas du literojn P, dum **apercevoir** «ekvidi» entenas nur unu. Do, tute prave, Zamenhof forigis ilin, kiu ajn estas la fontolingvo. Ekzemploj:

Latina deveno: **abbās** → abato\*, **ammōnīācum** → amoniako\*, **cessāre** → ĉesi\*, **flamma** → flamo\*, **classis** → klaso\*.

Greka: **Ἀχιλλεύς** → Aĥilo°, **Σκύλλα** → Scilo°, **συλλαβή** → silabo\*.

Franca: **dresser** → dresi\*, **frapper** → frapi\*, **frotter** → froti\*.

Itala: **allegro** → alegro°, **appoggiare** → apogi\*, **dilettare** → dilet\*.

Germana: **Galle** → galo\*, **Offizier** → oficiro\*, **Pfennig** → pfenigo\*, **Rippe** → ripo\*, **spinnen** → ŝpini\*, **schütten** → ŝuti\*.

Angla: **appear** → aperi\*, **funnel** → funelo\*, **muff** → mufo\*.

Rusa: **касса** → kaso\*, **класс** → klaso\*, **миссия** → misio\*.

Pola: **kassa** → kaso\*, **massa** → maso\*, **myrra** → mirho\*.

Hebrea: **הַגָּדָה** *haggada* → hagado°, **מַצָּה** *macca* → maco\*.

Araba: **الله** *allah* → Alaho°.

Tiu foresto de la duoblaj konsonantoj povas esti kaŭzita ankaŭ de slava influo, ĉar en rusa kaj pola, la duoblaj konsonantoj estas tre maloftaj.

Tamen tio ne estas absoluta regulo, kaj **esceptoj** ekzistas, ĉefe en mallongaj vortoj, aŭ por eviti konfuzon kun homonimo. Sed ne nur en propraj nomoj.

Jen du Fundamentaj vortoj kun duobla konsonanto:

Anno\* (Ekzercaro S 36) ← greka-latina ἄννα, Anna;

Ŝillero\* (Gramatiko, krom en la rusa parto) ← germ. Schiller.

Kaj ekzistas multaj zamenhofaj vortoj entenantaj duoblan konsonanton. Jen la ĉefaj: brutte°, Buddo°, bullo°, Finno°, Gallo°, Kannoĵ°, nette°, Pirro°, regatto°, villo°. Do oni ne povas rifuzi PIVajn vortojn, kiel: anno, Bonno, Cinno, Dekkano, Eddo, Emma, getto, Grakkoj, Isso, Krasso, Lasso, Mekko, Messo, Nesso, Osso, pullo, robbo, Sommo, Sullo, ŝvanna, Tasso, tinno, Tullo, vatto, vendetto, k.a.

Des pli ke Esperanto entenas ankaŭ vortojn kun duobla vokalo: Aarono°, Baalo°, Isaako°, Kanaano°, kooperi, koopti, koordinato°, looko, maato°, oolito, Saaro, ktp. Do, se oni akceptas duoblajn vokalojn, kial ne akcepti duoblajn konsonantojn kiam ili montriĝas utilaj?

#### XIV. LA GEOGRAFIAJ NOMOJ

Ĉi tie ne estas la loko por pritrakti detale la problemon de la geografiaj nomoj. Sed oni povas rimarki unu precizan zamenhofan emon. Kiam unu geografia nomo havas plurajn formojn, depende de la lingvoj, plej ofte Zamenhof elektis **ne la enlandan formon**, sed la formon kiun li juĝis **plej internacia**.

Ekzemple, la nomo de Florenco°, itala urbo, ne venas de la itala Firenze, sed de la latina Flōrentīa, franca-angla Florence, germana Florenz, rusa Флоренция, pola Florencja. Same:

Bukareŝto° (rum. București) ← franca Bucarest, angla Bucharest, germ. Bukarest, rusa Бухарест, pola Bukareszt.

Finnlando° aŭ Finlando° (finne Suomi) ← franca Finlande, germ. Finnland, angla Finland, rusa Финляндия, pola Finlandia.

Germano\* (germ. Deutsche) ← lat. Germānus, angla German.

Greko° (greke Ἑλλην) ← lat. Græcus, franca Grec, angla Greek, rusa грек, pola Grek.

Hispan(uj)o\* (hisp. España) ← lat. Hispānia, rusa Испания, pola Hiszpania.

Hungaro° (hung. Magyar) ← franca Hongrois, germ. Ungar, angla Hungarian.

Kolonjo° (germ. Köln, ruse Кёльн) ← lat. Cōlōnīa, franca-angla Cologne, pola Kolonia.

Lisbono° aŭ Lisabono° (port. Lisboa) ← franca Lisbonne, germ. Lissabon, angla Lisbon, rusa Лиссабон, pola Lizbona.

Norveg(uj)o° (norv. Norge) ← franca Norvège, germ. Norwegen, rusa Норвегия, pola Norwegia.

Prago° (ĉeĥe Praha) ← franca-angla Prague, germ. Prag, rusa Прага, pola Praga.

Rus(uj)o\* (ruse Россия, pole Rosja) ← franca Russie, germ. Rußland, angla Russia.

Sved(uj)o° (svede Sverige) ← franca Suède, germ. Schweden, angla Sweden.

Tamizo° (angle Thames, germ. Themse) ← franca Tamise, pola Tamiza.

Varsovio\* (pole Warszawa, ruse Варшава) ← lat. Varsovia, franca Varsovie.

## De la sama aŭtoro

**AKADA LEKSIKONO.** Asiriaj kaj babiloniaj vortoj, kun parencaj vortoj hebreaj, arabaj, siriakaj, etiopaj, kaj esperanta traduko. Eldono de la aŭtoro, 1989, 88 paĝoj.

**LA MORTINTA REĜINO.** Dramo en tri aktoj de Henry de Montherlant, esperanta traduko de André Cherpillod. Eldono de la tradukinto, 1986, 132 paĝoj.

**JEANNE D'ARC AU BUCHER, ĴANA D'ARKO ĈE LA ŜTIPARO.** Oratorio de Paul Claudel, enkonduko, originala franca teksto, esperanta traduko kaj dulingvaj notoj de André Cherpillod. Eldono de la tradukinto, 1986, 140 paĝoj.

**שִׁיר הַשִּׁירִים KANTO DE KANTOJ.** Enkonduko, originala teksto, esperanta traduko, filologia komento kaj indekso. Eldono de la aŭtoro, 1988, 138 paĝoj.

**NEPIVAJ VORTOJ.** Listo de 6800 esperantaj vortoj trovitaj ĉe diversaj aŭtoroj, sed ne troviĝantaj en la P.I.V., kun indiko de la fontoj. Eldono de la aŭtoro, 1988, 182 paĝoj.

**LA AGLUTINAJ LINGVOJ KAJ ESPERANTO.** La strukturo de la aglutinaj nacilingvoj, kun multaj ekzemploj, kaj komparo kun la strukturo de Esperanto. Eldono de la aŭtoro, 1988, 24 paĝoj.

**LA DIOJ DE IZRAELO: la vera naturo de la Biblia dio.** Studo de la nomoj de Dio en la Biblio, finvenanta al la konkludo, ke temas pri vortoj vere en pluralo, kaj ne pri unika dio. Eldono de la aŭtoro, 1990, 24 paĝoj.

**GLOZEL KAJ LA PRAHISTORIA SKRIBO.** Historio de la arkeologia afero de Glazel, kaj studo de la paleolitika kaj neolitika skriboj. Eldono de la aŭtoro, 1991, 134 paĝoj.

**MIL EKZOTAJ VORTOJ.** La etimo de 1250 esperantaj vortoj de origino araba, hebrea, sanskrita, japana, ĉina, malaja, amerika, oceania, afrika, ktp. Eldono de la aŭtoro, 1992, 122 paĝoj.

**ETIMOLOGIA KOMPARA VORTARO DE ESPERANTO.** La etimo de la 4000 ĉefaj esperantaj vortoj; komparo kun la hindeŭropa, kelta, ĝermana, slava, greka, armena, sanskrita, ktp. Aperonta eble en 1993.

ISBN 2-906134-11-2

© André CHERPILLOD  
kaj la Eldonejo *La Blanchetière*

F-72320 COURGENARD

1990